


esperanto

aprilo 1968

61-a jaro

n-ro 749 (4)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



60-jara

ESPERANTO

revuo internacia

nhavo

- 45 UEA 60-jara
Lingva diskriminacio en publika servo (V.S.)
- 46 Hector Hodler kaj la fondo de UEA (Holmes)
- 49 Ses klasikaj sonetoj hispanaj (tr. de Diego)
- 50 Al pli dinamika koresponda kurso (Lingua)
- 51 De aŭ da? (Parto unua) (Vatré)
- 52 CED
- 53 Letero
- 54 Recenzoj
Nekrologoj
- 56 Ricevitaj eldonaĵoj
- 57 Mallonge
- 59 Seminario Grésillon: Modernaj formoj de
laboro en la nuntempa Esperanto-movado
- 60 La Juna Vivo
- 61 Esperanto en radio
- 62 53-a Universala Kongreso, Madrid, 1968
- 63 Oficiala informilo n-ro 411
- 64 Anoncetoj

ovrila bildo

Kelkaj aspektoj de la nuntempa agado de UEA. De supre, dekstrume: La Universalaj Kongresoj; la Propono al Unuiĝintaj Nacioj; tabulo en la Universala Ekspozicio; la Oratora Konkurso; la Internacia Somera Universitato (prelegas prof. Waringhien); la Infanaj Kongresejoj; la Centra Oficejo en Rotterdam (foto: Milan Sudec); la Internacia Arta Teatro (foto: Patko klára). Meze: portreto de Hector Hodler, fondinto de UEA (1917).

ildojn liveris

- 48 Harry S. Blaine
- 59 M. Tomialoje
- 62 Pomaron, Zaragoza

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

esperanto
prilo 1968

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1968): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj. Unuopa numero: 1,— gld.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en ĉ. 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx, Britujo. S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado, Postbus 412, Eindhoven, Ned.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk 1, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

D-ro Peter Zlatnar, estrarano pri kongresoj, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

Nia ĉi-monata kovrila bildo celas iel resumi la vastan agadon, kiun disvolvis UEA precipe en la lastaj jaroj: la postmilitaj Universalaj Kongresoj donis al meze pli ol 2000 personoj jare okazon internacie pritrakti plej diversajn temojn; la Artajn Festivalojn riĉigis prezentoj de Internacia Arta Teatro, laboranta sub aŭspicio de UEA; al la kulturo de la Internacia Lingvo multon kontribuis ankaŭ la Internacia Somera Universitato, la Belartaj kaj Oratoraj Konkursoj; la Infanaj Kongresoj donis fortan impulson al tiuj familioj, kiuj akceptis la lingvon kiel heredan; la Centro de Esploro kaj Dokumentado kaj la Universala Ekspozicio, kiun kreis CED, ludis esencan rolon en la atingo de la Unesko-rezolucio en 1954; novan

prestigon alportis la Propono al Unuiĝintaj Nacioj en 1966; en la propra Domo de UEA la Centra Oficejo plenumis sian kunordigan rolon, administris la delegitan reton, la eldonaĵojn, libroservon kaj Bibliotekon Hector Hodler.

Sur la sekvantaj paĝoj la honora prezidanto s-ro Holmes rekonstruas por ni la eventojn kaj personecojn ĉirkaŭ la fondo de tiu ĉi mondaleksa entrepreno.

Hodiaŭ, tamen, en la Jaro de Homaj Rajtoj, UEA turnas sian atenton ne al si mem, al ĉio jam atingita, sed eksteren — al tiuj naciaj pretendoj, kiuj ĉie en la mondo sentiĝas daŭre kiel la bazo de lingva maljusteco kaj lingva diskriminacio.

LINGVA DISKRIMINACIO EN PUBLIKA SERVO

"Ĉiu rajtas je egala aliro al publika servo en sia lando" (Artikolo 21 (2) de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj). Plimulto da landoj en la hodiaŭa mondo estas plurlingvaj. Se la oficiala administra lingvo de la lando estas la gepatra lingvo de nur parto de ĝia popolo, ĉu ĉiuj havas egalan aliron al publika servo?

Klaran negativan respondon donis jam ia franclingvanoj en Kanado, la nederlandlingvanoj en Belgujo, la ĉinoj kaj hindoj en Malajsio, la tamiloj en Cejlono kaj multaj aliaj popoloj. Iuj jam gajnis grandajn venkojn per akceptigo de specialaj leĝoj, aliaj restas en stato malavantaĝa.

En Belgujo la akcepto de diversaj lingvaj leĝoj konsiderinde plibonigis la ŝancojn de la flandroj eniri la publikan servon, kiun antaŭe monopoligis la franca lingvo. Same pliboniĝis, kaj plue pliboniĝos sekve al la lastatempa raporto de la Reĝa Komisiono pri Dulingvismo, la situacio en Kanado, kie ĝis antaŭnelonge la franclingvanoj ekster Kebeko havis malpli bonajn ŝancojn promociiĝi, ol la anglalingvanoj.

Gvidlinion por Soveta Unio metis jam Lenin: "Demokrata ŝtato devas senkondiĉe agnoski plenan liberon de diversaj lingvoj kaj forĵeti ĉiajn privilegiojn de unuopaj lingvoj". En sia "Kulturo nacia kaj internacia" Stalin defendis la ekziston de naciaj respublikoj en Soveta Unio per tio, ke ĝi donas "la eblon havi lernejon, juĝejon, administron, publikajn kaj aliajn organizojn en gepatra lingvo".

En siaj unuaj jaroj la novaj eks-koloniaj ŝtatoj de Azio kaj Afriko disponis oportunan neŭtralan solvon, nome la lingvon de la antaŭaj regantoj. Sed iom post iom malfortiĝis la pozicio de la eŭropaj lingvoj, kaj en iuj landoj jam transprenis la rolon de oficiala lingvo tiu aŭ alia indiĝena lingvo — malofte, tamen, kun la aprobo de la tuta popolo.

La akcepto de la hindia lingvo kiel oficiala

lingvo de Hindujo signifis neeviteblan lingvan avantaĝon por tiu parto de la popolo — ĉirkaŭ unu triono — kiu parolas ĝin denaske, kaj la rezisto de aliaj naciaj grupoj ĝis nun sukcese prokrastigis ĝian plenan enkondukon.

Similaj timoj flanke de la tamila malplimulto kaŭzis sangan malpacon en Cejlono en 1956 kaj 1961 kaj devigis la registaron modifi sian politikon fari la sinhalan la sola lingvo de publika administrado.

En Malajsio, kie la malaja lingvo estas nun la ĉefa oficiala sed la gepatra lingvo de nur ĉ. 15 % de la popolo, leĝo de 1967 allasis uzon de la "neŭtrala" angla lingvo por administrado, parlamento, kortumoj k.s.


Ke la situacio en Honkongo estas maljusta (la oficialan lingvon, la anglan, parolas denaske malpli ol 1 % de la loĝantaro), tion apenaŭ necesas atentigi. La samo validas pri aliaj koloniaj teritorioj.

En Sud-Afriko, laŭ raporto de Unesko en 1967, "la angla kaj la afrikansa estas la solaj oficialaj lingvoj; la bantuaj lingvoj ne estas uzataj en administrado, industrio, komerco kaj bankoj." Sed la bantulingvanoj (la granda plimulto de la loĝantaro) havas tute nesufiĉajn eblecojn eĉ por ellerni la anglan aŭ afrikansan kiel duan lingvon.

Pri internacia publika servo, ekzemple en la Sekretariejo de Unuiĝintaj Nacioj aŭ Unesko, la Universala Deklaracio menciis nenian similan rajton. El la lastatempaj luktoj ĉe UN por la egalranga uzado de la franca lingvo estas tamen evidente, ke la ŝtatoj-membroj forte konscias la maljustecon de la nuna sistemo, en kiu, laŭ raporto de la Ĝenerala Sekretario de UN, ĉ. 40 % de la oficistaro povas labori en sia gepatra lingvo, sed la ceteraj ne.

Por la tempo, kiam montriĝos neatingebla ia kompromiso inter la postuloj de justeco kaj egaleco, unuflanke, kaj de praktikeco kaj ekonomio, aliflanke, la solvo per neŭtrala internacia lingvo staras preta.

V. S.



Hector Hodler
(1887-1920)

HECTOR HODLER KAJ LA FONDO DE U.E.A.

Okaze de la 60-jara datreveno de la fondo de Universala Esperanto-Asocio, s-ro H. W. Holmes, honora prezidanto, skizas la tragedian biografion de la fondinto, Hector Hodler, lian amikecon kun Privat, la kontraŭstaron al la starigo de internacia organizaĵo kaj la hardajn malfeliĉojn de la juna Asocio ĝis la morto de Hodler.

En 1903 okazis en Svisujo ŝajne malgrava evento, kies sekvoj profunde influis la historion de Esperanto.

Dekkvarjara knabo nomita Edmond Privat montris Esperantan gramatikon al sia deksejjara amiko. Ĉi tiu estis Hector Hodler, kiu, laŭ Privat, estis "alta, malgrasa, malriĉa kun mirindaj okuloj kaj senordaj brunaj haroj kronantaj lian belan grekan frunton". Nemirige, Hodler devis esti modelo por sia pentrista patro Ferdinand Hodler.

Al Privat li respondis kun entuziasmo, ke li jam eklernis la lingvon. Dum promenadoj ili konversaciis kaj baldaŭ povis flue paroli. Ili eĉ lernis du aliajn lingvajn projektojn, por ke ili estu certaj, ke Esperanto plej taŭgas kiel internacia lingvo.

Ili fondis klubon kaj sukcesis eldoni gazeton "Juna Esperantisto", kiun ili redaktis de sur benko en la kursĉambro, kaj ricevis patrecajn leterojn de gratulo de d-ro Zamenhof kaj prof. Cart.

En postaj jaroj Privat doktoriĝis, fariĝis universitata profesoro kaj dum sia longa vivo atingis eminentecon en kaj ekster la Esperanto-movado.

Vivo mallonga sed faroplena

Kontraste, estas dube, ĉu Hodler finis siajn gimnaziajn studojn, antaŭ ol li tute dediĉis sin al Esperanto. Nelonge li vivis, sed li tiom faris por Esperanto, ke eĉ la akre kritikema rusa historiisto Drezen skribis "La historio de la amasa internacia esperanta organizado estas nedisigeble ligita kun la nomo Hector Hodler".

Notu la vorton "amasa". Hodler fondis U.E.A. por doni eblecon kaj instigon al la popolamaso ĉie en la mondo utiligi kaj uzadi Esperanton.

Por kompreni, kiel radikale Hodler, kvankam junulo, ŝanĝis la direkton de la evoluo de Esperanto, oni devas konstati la influojn, kiuj formis la tiaman karakteron de la movado.

Kompreneble en 1887 Zamenhof estis devigata pro cirkonstancoj direkti sian vokon al individuoj. Tamen, per la eldono de la adresaro de tiuj, kiuj jam lernis Esperanton, li helpis al la formiĝo de grupoj, kiuj estis la unua formo de kolektiva organizaĵo.

Estis francaj grupoj, kiuj en 1905 organizis la unuan Universalan Kongreson, kiu, kvankam mirinda pruvo, ke Esperanto plene taŭgas kiel internacia lingvo, tamen rifuzis aprobi la starigon de internacia movado. Oni taksus tion stranga, sed letero de Zamenhof montras, ke, kvankam li volis "Ligon Tutmondan", potencaj francaj individuoj ne volis starigon de tia organizaĵo.

Tamen la bezono de internacia centro estis tiom sentata, ke en 1905/6 generalo Sebert kaj s-ro Javal plejparte je propra kosto starigis la "Internacian Centran Oficejon" en Parizo por administrado kaj dokumentado.

Sed en 1905/6 oni preparis ankaŭ la duan Universalan Kongreson, kiu okazis en 1906 en Ĝenevo, la hejmurbo de Hodler kaj Privat. Ambaŭ servis kiel sekretarioj en la Kongresa Komitato.

La propono pri "konsuloj"

Dum la Kongreso s-ro Carles proponis, ke estu Esperantaj "konsuloj" en urboj por doni servojn al komercistoj kaj vojaĝantoj. La Kongreso rekomendis al Societoj kaj grupoj, ke ili realigu la proponon, kie ajn tio estos ebla. Pri tio s-ro Carles komentis "Se la konsuloj kreigas mem, senkontrole, ni baldaŭ havos disigitan korpon senkapan". Antaŭvidante tion Carles proponis la starigon de komitato por organizi la servon, sed la Kongreso rifuzis tion fari.

Je la sama tempo s-ro Rousseau en artikolo proponis, ke estu Esperantaj Oficejoj, kiuj vendu esperantaĵojn, surhavu afiŝojn kaj provizu tradukservon al neesperantistoj.

Spite la mankon de organizado, jam antaŭ la 3a Kongreso en 1907 la nombro de Konsuloj atingis 200, kaj en la vintro de 1907 aperis broŝuro "Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj" kies antaŭparolon subskribis Carles, Hodler, Meyer kaj Rousseau.

Kiel estas, ke la nomo de Hodler troviĝas tie?

Jam Hodler estis ĝenerale konata ne nur pro siaj fruaj artikoloj kaj eldonita traduko de romano, sed ankaŭ ĉar en 1906 per kelkaj centoj da frankoj li aĉetis la gazeton "Esperanto" kaj jam la 12an de Februaro 1907 publikigis sian unuan numeron. La gazeto donis al li la eblecon per trafikaj artikoloj antaŭenpuŝi siajn konvinkojn, ekzemple, "La venko venos tuj kiam oni komprenos, ke nia afero ne estas ia ludo aŭ entrepreno apartigita de la kutima vivo, aŭ iu pure ideala sento, sed ke ĝi devas eniri la kampon faktan kaj praktikan de nia ĉiutaga vivo." La gazeto enhavis liston de Konsuloj kaj Esperanto-Oficejoj. Jam oni povis vidi la ĝermon de U.E.A.

Sed en 1907 okazis lingva krizo, kiam speciale starigita komisiono rekomendis Esperanton kiel internacian lingvon sed proponis tiel reformi la lingvon, ke ĝi ne plu estus Esperanto.

Hodler en "Esperanto" kaj en cirkulero esprimis sian opinion ke "neniu havas rajton

enkonduki reformon per dekreto" kaj ke "estas dezirinda la starigo de internacia organizaĵo, kiu puŝos Esperanton rekte en la vojon de la praktikaj aplikaĵoj kaj, starigante nian aferon sur praktika materiala fundamento, fortigante la ligon de solidareco inter samideanoj uzantaj tiun lingvon, metante la unuecon de nia movado ne nur sur la fideleco de ĝiaj partianoj, sed ankaŭ sur la utileco al ili de tiu ilo, kiun ili penas diskonigi, ŝirmos por ĉiam nian entreprenon kontraŭ ĉiuj danĝeroj kaj ĉiuj atencoj".

Kiam, feliĉe, rapide solviĝis la krizo pro la rifuzo de esperantistoj akcepti la proponitajn reformojn, Hodler sendis en Februaro, 1908 duan cirkuleron kun la antaŭa propono pri internacia organizaĵo. Jam la 1an de Marto 1908 aperis en "Esperanto" la unua listo de la aliĝintoj kaj fine de Marto Hodler elsendis trian cirkuleron, kiu proponis por voĉdono "provizoran regularon de Universala Esperanto-Unio," nomo tuj ŝanĝita manskribe de Hodler al "Universala Esperanto-Asocio".

La dudek-oka de aprilo mil naŭcent ok

Ĝis la 28a de Aprilo 1908 alvenis 59 respondoj de grupoj, 57 aprobantaj, kaj tiu estas la oficiala dato de la fondiĝo de U.E.A.

La 1an de Majo, 1908, aperis en "Esperanto" la unua oficiala informilo pri Universala Esperanto-Asocio kun la ciferoj de la voĉdono, la provizora regularo kaj la nomoj de la komitato.

La komitato konsistis el Fakoj I Administrado: H. Bolingbroke-Mudie, H. Hodler; Fakoj II Esperanto-konsuloj kaj -oficejoj: A. Carles, Th. Rousseau, S. Meyer, R. Meany, P. Blaise; Fakoj III Turismo: J. Schmit, d-ro Whitaker.

Post dek jaroj, en "Esperanto" Aprilo, 1918, Hodler priskribis sian rolon je la fondiĝo, jene, "Ni spertis, ke la pure predikema propagando ne sufiĉas: post nedaŭra entuziasmo multaj varbitoj forlasos nian aferon, ĉar ili ne scias tiri utilon el Esperanto. Fine, aliĝinte al Esperanto, precipe ĉar ni vidis en ĝi efikan ilon por la alproksimigo de la popoloj kaj ilia paca kunlaboro ni opiniis, ke ankaŭ en tiu rilato internacia organizaĵo sur neŭtrala fundamento de esperantismo povas ludi utilan rolon".

La plimulto de la esperantistoj ĝojis pro la nova entrepreno, sed Hodler skribas "...ĉe kelkaj tiamaj gvidantoj de nia movado ĝi vekis nur tre moderan entuziasmon. Iuj timis, ke tiu nova organizaĵo sin okupos pri lingvaj demandoj; aliaj, ke ĝi volas direkti la informadon kaj anstataŭi la ekzistantajn societojn; iuj, ke ĝi konkurencos la naciajn societojn; aliaj, ke ĝi estas kreaĵo de senaŭtoritataj junuloj...".

Pri tiu kritiko Hodler rifuzis polemiki sed diris "Respondo per faktoj estas ĉiam pli konvinkiga ol respondo per teoriaj artikoloj". Kiel saĝa estis tiu decido, oni povas konstati, se oni legas la leterojn, kiuj pasis inter diversaj francoj kaj Zamenhof en tiu tempo.

La respondo per faktoj estis tuj donita. Rapide estis aranĝitaj oficejoj kaj elektitaj dele-

gitoj (nova nomo por konsulo) kaj jam en Julio 1908 U.E.A. ricevis leteron de Zamenhof jene:— "Kun plezuro mi danke ricevis la diversajn specimenojn, kiujn vi sendis al mi. La rapida kaj bonega disvolviĝo de U.E.A. min tre ĝojigas, kaj mi esperas de via asocio tre multe da bono por nia tuta afero. Mi kore deziras al U.E.A. la plej bonajn sukcesojn. Vian afablan inviton, ĉeesti en Dresdeno en la solena malferma kunveno kaj en unu el la laboraj kunvenoj de via asocio, mi akceptas kun plezuro".

Sed tiu sukceso venigis problemojn kaŭzitajn ĉefe pro (1) granda deziro multilate servi (2) komplika oficeja sistemo kaj (3) ridinde eta kotizo de 60 centimoj.

Rilate la servojn, regule aperis "Esperanto", kaj en 1908 la unua eldono de la jarlibro. Kvankam tiujare nur 24-paĝa, ĝi havis en 1909 539 paĝojn. Al la fakoj administrado, konsuloj (delegitoj) kaj oficejoj, kaj turismo jam aperintaj en la komitato estis aldonitaj komerco kaj industrio, junuloj, kaj aerveturado.

Rilate al la oficeja sistemo, estis kreitaj belaj kontoj por ĉiu delegito en spesmiloj, kaj membrokartoj konforme al la numerado de la Bibliografia Instituto en Bruselo.

Rilate la kotizon, kvankam Hodler vivtenis sin per malgrandaj pagoj ricevataj de lia patro, posta sperto montris, ke la kotizo unue postulata estis nur kvarono de la minimumo bezonata.

Ed. Stettler venis al Ĝenevo en 1910 por donaci du jarojn da libervola laboro. Jarojn poste li fariĝis Prezidanto de U.E.A. kaj laboris por ĝi ĝis 1934. En sia libro "Hector Hodler — lia vivo kaj verko" li diras "por tia entreprenego dekduo da oficistoj estus ĝuste sufiĉaj". Sed li trovis "ĉambro-keston malgrandan — ĉe la fenestro Hodler... kaj unu oficisto rusa inteligenta kaj malordema".

Tamen eĉ en 1908 al la kongreso en Dresdeno la turista fakoj organizis kvar karavanojn kun 200 partoprenantoj. Okazis la unuaj kunvenoj de U.E.A. en la kadro de la Universala Kongreso. Ĉi tio emfazas, ke komenciĝis disdivido de la movado en du partojn, la nacian kaj la supernacian de U.E.A. Waringhien komentas pri tio: "bezonis preskaŭ du mondmilitojn por fine likvidigi".

Signoj de kolapso

La signoj de kolapso de la oficeja laboro kaj tiel de la asocio estis klaraj. Do per nova statuto la 1an de Oktobro, 1910, oni forigis la sistemon de memstaraj fakoj, kiuj kaŭzis amason da interkorespondado, kaj donis al la komitato la ĝeneralan gvidadon de la asocio kaj komisiis la oficejon koncentri la disigitajn klopodojn.

Rilate simpligon de oficeja sistemo Stettler diras "la kongresoj 1911 kaj 1912 ĉefe okupiĝis pri nia financa mizero. Dank' al kotizaĵo tro malalta, 60 centimoj dum 1908, 90 centimoj dum 1909/10, 1.25 frankoj dum 1911/12, U.E.A. havis en 1912 pli ol 5,000 frankojn da ŝuldoj,

sumo por tiama tempo grandega". "Feliĉe, kaj estis plejlasta tempo, tiu kongreso en Krakovo akceptis la tiel nomitan 'financan reformon', nome kotizaĵon de 2,50 frankoj kaj atestojn de Garantiintoj po 12,5 frankoj".

Stettler ankaŭ diras, ke pro malfeliĉaj spertoj ili fariĝis prudentaj kaj ne entreprenis pli multe ol estis efektivebla.

Finfine ili forigis la pezan numeradon de delegitoj kaj akceptis simplan geografian kaj laŭnoman sistemon kaj en Februaro, 1913, forigis la spesmilan kalkuladon. La tuta oficejo estus ĝojinta, se, samtempe, ne estus forkurinta la kasisto. Tio ŝajne estis pli ĝena pro la interrompo de la librotenado kaj la serĉado kaj instruo de nova oficisto, ol pro la mono ŝtelita.

"De la jaro 1913 la cirkonstancoj iom post iom pliboniĝis; organizo kaj laborsistemoj kun tiom da penoj elprovitaj pruviĝis bonaj, anstataŭ plendleteroj pri malordo alvenis belaj kotizaĵoj, kaj pleniĝis la oficejo je sindonaj oficistoj. Tiam, tro malfrue, Hodler povis pli

atenti sian sanon. Somere li iris al la kamparo, tamen ne multe utilis tiaj restadoj mallongaj, ŝarĝitaj per la laboro prepari la kongreson, interrompitaj de la kongreso mem, kiu denove estis penado ĝuste dum la sezono, kiam aliaj mortuloj ĝuas liberecon."

"La militeksplodo, surprizinte la asocion en plena agado por la deka U.K., efikis la subitan foriron de la plimultaj oficistoj. Tuj Hodler alkuris. Ne esploru kun kiaj sentoj li denove okupis sin pri administraĵoj, penado lin tiom suferiginta multajn antaŭajn jarojn, ke li malamis ĝin pli kaj pli. Li sukcesis starigi servon por interŝanĝado de leteroj, kiu favore konatigis la oficejon kaj alportis al la kaso belan enspezon de respondkuponoj. Kompare kun aliaj, ni tamen estis modestaj postulinte 50 centimojn por perado, kiu sen la laboro kostis al ni minimume 2,5 frankojn".

En 1918 post longa fianĉeco Hodler edziĝis. Stettler diris "malgraŭ ke li estis preskaŭ perdinta la voĉon kaj pasigis siajn tagojn skribante sur kuŝseĝo mi sentis lin feliĉa. Varman dankon al lia edzino kiu per sindono malofta kaj zorga flegado tiom plibeligis la lastajn jarojn de nia amiko".

La 19an de Majo, 1918, lia patro mortis. La patro pli poste en la vivo fariĝis fama kiel pentristo kaj postlasis al la filo siajn riĉojn. Kvankam dum longaj jaroj torturita de sia malsano Hodler neniam plendis, sed oni povas kompreni liajn sentojn, kiam li diris "tiu tuta mono ne reaĉetos unu el miaj ruinigitaj pulmoj".

La 31an de Marto, 1920, la tuberkulozo fine venkis. La morto de Hodler venis je tempo, kiam la movado tre bezonis lian saĝecon kaj longan sperton. Li tre mankis, kiam dum la 12a Universala Kongreso, kiun ges. Isbrucker kuragis organizi jam en 1920, oni diskutis la estontan organizon.

Estonteco garantiita

Sed la aspekto de la problemo kaj la perspektivo de la estonteco estis tute alia, ol ĝi estis en 1908, ĉar aldone al la fundamento, kiun Hodler per sia laboro tiel firme starigis, estis la fakto, ke li testamentis sufiĉan monon por, kiel li esperis, garantii la estontecon de U.E.A.

Stettler finas sian rakonton pri la vivo de Hodler per citaĵo el la lasta paragrafo de lia dummilita porpaca verko. "La sorto, kiu nin enkatenigas kaj el kiu ŝajnas maleble liberiĝi, povas esti aliformigita per volo potenca. La batalo de la volo kontraŭ blindaj povoj estas la esenco de l' historio. Por fortaj animoj, la sorto ne estas tribunalo sen apelacio. Tial ni vekiĝu! Ni unuĝu! Kaj ĉefe ni laboru! Laboru!"

H. W. Holmes

La samurbano de Hodler, Edmond Privat, ellernis kune kun li la Internacian Lingvon. Sur la bildo: la 21-jara Privat diskutas kun junaj kongresanoj en Vaŝingtono, 1910.



Garcilaso de la Vega (1503-1536):

*Belegaj nimfoj en river' mergitaj,
loĝantaj kun feliĉo en salonoj
faritaj per brilantaj, glataj ŝtonoj
sur pilieroj vitraj kaj solidaj.*

*Ĉu super brod' laboras vi meditaj
aŭ teksas laŭ mirindaj fe-fasonoj,
ĉu vi parolas en diskretaj tonoj
pri viaj amoj, vivoj plej ekscitaj —*

*flanklasu la laboron, pro kompatato,
la blondan kapon levu, vin mi ĝenos
momenton nur en mia vea stato,*

*ĉar aŭ la sento via ne eltenos,
aŭ mi fariĝos akva pro larmado
kaj serĉe de konsol' al vi alvenos.*

Luis de Góngora (1561-1627):

*Dum viaj haroj, kiel or' radia,
triumfas super suno de mateno;
dum via ĉarma frunto en ĝardeno
fiere blankas super blank' lilia;*

*dum via buŝo tenta kaj magia
rigardojn sorĉas pli ol la jasmeno,
kaj dum per freŝo venkas, kun senĝeno,
eburon glatan via kol' gracia —*

*ĝuadu haroj, kolo, frunto, buŝo
antaŭ ol, kio estas en junaĝo
jasmen', eburo, oro kaj lilio,*

*fariĝos violgrizo tra l' vizaĝo
kaj, kun la tuta korpo jam en kuŝo,
polvo, vaporo, ombro kaj nenio.*

Luis de Góngora (1561-1627):

*La dolĉa buŝo montras sin invita,
ĝia humido lipa sorĉe tentas
kaj pli ol la nektaro eminentas,
kiun al Zeŭso verŝas fil' de Ida.*

*Sed vin fortenu! Tia buŝ' ekscita
el inter lip' kaj lipo nur prezentas
Amoron, kies sago ja identas
al, inter flor' kaj flor', vipur' kaŝita.*

*Ne trompu vin la rozoj de Aŭroro,
kaj diru ne, ke perle ili belas
falinte de la sino purpur-ruĝa.*

*Tantalaj pomoj ili sin rivelas:
eskapas ili post deloga horo,
kaj lasas nur venenon Amo fuĝa.*

Lope de Vega Carpio (1562-1635):

*Al bird' en kapto nutron foje donis
Lucinda, kaj tra l'pordo de la kaĝo
la birdo tuj elflugis kun kuraĝo,
ĉar, alte, la ĉielo sin proponis.*

*Per mana gesto vane ŝi oponis
ploreme al la birda forvojaĝo,
kaj palaj iĝis rozoj de l'vizaĝo
ardantaj inter neĝo. Ŝi rezonis:*

*"Ĉu lasas vi la neston senhezite
por fronti for al kuglo aŭ kaptilo
kaj fuĝas, eĉ se oni vin adoras?"*

*Aŭdinte ŝin la birdo kortuŝite
reflugis al la sama kaĝ-azilo.
Virino povas tiom, se ŝi ploras!*

Bartolomé Leonardo de Argensola (1562-1631):

*Don Jŭan, al vi konfesas mi, unue,
ke l' haŭto roza, neĝa, de Elvira
tiel imponas, estu mi verdira,
ĉar mone ŝi aĉetis ĝin, pli frue.*

*Sed same mi al vi konfesas plue:
ŝi trompe bela pompas triumf-ira,
kaj eĉ vizaĝo rava sed senŝmira
rivalas vane ŝin kaj rangas due.*

*Kio do, se freneze mi adoras
la falsulinon? Bone pensu: same
falseme la Natur' al ni aperas,*

*ĉar la ĉielo ĉarma, blua flame,
ne estas blua nek ĉiel'. Doloras,
ke tiom da beleco ja ne veras!*

Pedro Calderón de la Barca (1600-1681):

*La jena roz' de gaja, freŝa ĉarmo
pompanta en la brilo de l' mateno
forvelkos en kor-rompa, trista sveno
en brakoj de la nokta frost-malvarmo.*

*Rivalas kun la luma ĉielgarno
per la iriz' el neĝo kaj rubeno
kaj nin instruas tiu specimeno,
ke forrapidas viv' al lasta larmo.*

*La rozo frue levas sin kaj novas
sed en florad' apenaŭ tempon festas:
en la burĝon' lulilon, tombon trovas.*

*Tia la hom', en tia fat' li restas,
en lian vivon morto tuj sin ŝovas
— jarcentoj, forpasinte, horoj estas.*



Hugo Lingua

AL PLI DINAMIKA KORESPONDA KURSO

La koresponda kurso estas fako de la Esperanto-Movado, kiu nepre devas altiri specialan atenton de la koncernaj gvidantoj. Pruviĝis, ke ĝi estas absolute necesa, se oni volas dissemi Esperanton tra vastaj teritorioj, kie estas malfacile alvenigi regule kursgvidantojn; krome ĉe grandaj urboj ekzistas kaŭzoj (hortabeloj, transportoj, laboro, k.t.p.), kiuj malebligas la ĉeeston al kursoj.

La ĉefa bezono de ĉiu koresponda kurso estas akiri prestiĝon — oni rimarku, ke malbona priatentado ne nur nuligas la kurson sed efikas kiel bumerango kontraŭ la tuta Movado. La prestiĝon oni atingas per daŭra, kelkjara seriozeco en la organizo kaj AKURATECO en la respondoj. Atinginte iom da prestiĝo la afero ruliĝas glate, kaj la posta disvastigo plimultiĝas per la persona propagando de la gelernantaro.

Necesas klarigi, ke K.K. ne devas limiĝi al absolute nura instruado. Instrui kaj poste forlasi la kontakton kun la gelernantoj igas la laboron tute aŭ preskaŭ tute senfrukta. Do, la laboro devas celi jenon: Atingi lernantaron; igi ilin lerni; faciligi ilian kontakton kun la Movado; ligi ilin al la Movado, ĝis ilia maturereco permesos, ke ili solaj daŭrigu.

Surbaze de spertoj akiritaj kiel Sekretario de Informado de Argentina Esperanto-Ligo kaj kiel Direktoro de ĝia K.K., ni kreis en 1961 ARGENTINA ESPERANTO-LERNEJO-n, kiel privatan senprofitcelan organizon, kaj laŭgrade ni kreis diversajn fakojn, ĝis ni atingis la nunan organizon, kiu laŭsajne estas sufiĉe bona.

La sistemo aplikata antaŭe konsistis jene: post la enskribiĝo de la lernanto oni sendis la kurson kun la necesaj lernobroŝuroj — sendo de la tuta kurso unufoje aŭ plurfoja parta sendo donis saman rezulton — kaj poste oni korektis, gvidis, helpis la lernanton ĝis la fino. Tiu sistemo montriĝis tro mekanika kaj iom malvarma; nur la persona klopodo de la instruisto — eco ne ĉiam havebla inter la instruistaro — igis la kurson iom pli interesa.

Tial ni ideis sistemon, kiu krom la instruado aldonas informadon kaj intereson pere de la kontakto kun la Esperanta vivo, jen pli dinamika instruado. Tio estas: la lernanto subskribas kontrakton kun la Lernejo; tiel la lernanto pagas la kurson — oni postulas nur la koston laŭ budĝeto farita surbaze de la antaŭajara spezo — kaj la Lernejo SIN DEVIGAS sendi al li, krom la kurso kaj la lernobroŝuro:

Ek de la 1a leciono ricevita: novaĵojn pri Esperanto (oni sendas la unuan paĝon de nia revuo, en kiu aperas la novaĵoj de IGS);

ek de la 5a leciono aprobita: Esperantajn revuojn kaj broŝurojn; minimume po unu por ĉiu leciono;

aprobinte la 8an lecionon: oni sendas presaĵon kun modelo de letero por sendi al eksterlando kaj komenci la internacian

korespondadon — kun posta helpo de la Lernejo por la daŭrigo;

aprobinte la 12an lecionon: oni sendas la Vortaron Esperanto-hispanan;

aprobinte la 15an lecionon, oni abonigas la lernanton senpage al nia revuo ĝis la fino de la jaro.

Sed krome la kontrakto fiksas, ke, se la lernanto ne sendas aŭ ne faras korekte la lecionojn (ĉi-kaze oni insistas kaj helpas por plua studado) li NE RAJTAS POSTULI ION; eĉ ne, kompreneble, la redonon de la pago.

Tiu ĉi sistemo montriĝis tre efika; ĝi donis jenan komparan rezulton:

	Antaŭa sistemo	Nuna sistemo
Ne komencis la kurson	50 %	10 %
Komencinte, forlasis	28 %	22 %
Daŭrigas en la dato de la statistiko (fino de 1967)	10 %	48 %
Finis la kurson	12 %	20 %

Per tiaj elementoj oni povas konkludi, ke la procentaĵo de finintoj estos multe pli granda, se oni konsideras, ke ankoraŭ 48 % daŭrigas la kurson.

La Lernejo klopodas ĉiel interesigi daŭre la gelernantojn, kaj tial oni plenumas ĉiujn iliajn petojn kun eĉ ankoraŭ pli bonaj respondoj ol dezirataj (donaco de libroj, presaĵoj; pruntedono de libroj, diskoj, k.t.p.). Ni ne postulas ion por ekstra servo. Se oni demandas kiel aĉeti diskojn aŭ librojn, ni konsilas sin turni al la reprezentanto de UEA, sed samtempe, se ni povas, ni sendas prunte aŭ la saman aŭ similan, sen antaŭaj postuloj pri elspezoj aŭ iaj aliaj kondiĉoj, kaj fiere ni povas diri, ke praktike neniam iu lernanto restigis al si pruntaĵojn. Tian servon ni povas fari utiligante la monprofiton, kiu restas de tiuj lernantoj, kiuj, enskribiĝinte, ne komencas aŭ forlasas la kurson, kaj, se iam tio ne sufiĉas, pere de aliaj rimedoj.

Al perfektiga kurso aliĝas 80 %

Tia agadmaniero — sindono de la Lernejo al la lernantaro — donis tiajn fruktojn, ke, ekzemple, 80 % de la finintoj aliĝis tuj al la Perfektiga Kurso. Por ligi la lernantaron ni kreis — kiel menciite — LERNEJA ESPERANTA REVUO-n, bulteno, kiu aperas regule ĉiumonate kun novaĵoj, informoj, literaturo, klerigaj kaj primovadaj artikoloj; kaj samtempe por la ĝenerala perfektigo ni funkciigas Cirkulantan Bibliotekon, kiu disponigas librojn, broŝurojn kaj diskojn al la interesatoj.

Ĝis kia grado ni povas evolui, ni ne povas diri; tio dependas de la cirkonstancoj, sociaj kaj kulturaj ŝanĝoj, kostoj, reago de la publiko en la problemoj de la lingvaj baroj; ĉi tion, ni ĉiam atente pristudas por modifi la sistemon cele al pli bona organizo.

Laŭ la 14a regulo de la Fundamenta Gramatiko, ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon. Do, implicate, nur unu solan ĉiam saman signifon.

Tri distingiloj inter de kaj da

La unua distingo inter DE kaj DA estas: DA obeas la 14an regulon, sed DE ne ĝin obeas. La Plena Vortaro registras 12 diversajn signifojn por la prepozicio DE, kaj nur 1 por DA. Pro la parenceco inter ambaŭ vortetoj, oni povus preskaŭ diri, ke DA signas la 13an signifon de la prepozicio DE. Plurtaska servisto, DE enkondukas laŭbezzone suplementon de posedo, origino, konsisto, loko, tempo ktp. DA, rigore specifa, enkondukas nur suplementon de mezuriteco.

La dua distingo jenas: DE ĝuas multe pli vastan kampon de apliko, ol DA. Laŭ statistiko de vortofteco kompilita el ampleksaj tekstoj de bonaj prozistoj (de Zamenhof ĝis Boulton), DE aperas meznombro 12-oble pli ofte, ol DA. Ĉe simplaj esperantistoj (al kiuj mi apartenas) mi plurfoje konstatis misuzon de DA anstataŭ DE. La inverso ŝajnas malpli ofta, sed aliaj legantoj faris eble malsaman konstaton. En la Universala Vortaro la germana klarigo por DA entenas la vortojn "ersetzt den Genitiv" (anstataŭas la genitivan); ili estas erarigaj, kaj malgraŭ la netuŝblo de la Fundamento, mi konsilas ilin enpense forigi por eviti konfuzon.

Tria distingo: La kondiĉoj plenumotaj por uzi DE estas relative (eĉ tro!) liberalaj, sed la korekta uzo de DA dependas de du striktaj kondiĉoj:

1. La antaŭa substantivo devas havi signifon de *mezuro*. 2. La posta substantivo (suplemento) devas esti *nepre nedifinita*.

Mezuro kaj difino

Nu, kio estas *mezuro*? Ĝi povas esti preciza (gramo, litro, metro, deko ktp.), proksimuma (guto, floko, botelo, sako ktp.) aŭ malpreciza (aro, grupo, kolekto, amaso ktp.). Multaj vortoj uzataj metafore povas akcepti signifon de mezuro: *nubo da korvoj*, *maro da mizeroj*, *sen ia ombro da dubo*.

Kaj kio estas *difinita* substantivo? Ĝi estas substantivo, kiun antaŭas la *artikolo*, ĉiu ĉiuj, tuta, la montraĵoj, personaj, posedaj, nombraj pronomoj aŭ adjektivoj. Substantivo povas esti difinita ankaŭ per si mem, se ĝi montras precizan kvanton. Ekzemple la nomoj de unuo: horo, tago, jaro, dolaro, guldeno ktp., kiam uzataj singulare. Antaŭ ili oni ne uzos DA: parto de jaro (sed: parto da tempo). Post duono, triono, kvarono kaj aliaj onoj neniam uzu DA, ĉar per si mem tiuj frakcioj *difinas* sian suplementon, la postan substantivon. Diru: duono de pano, kvarono de paĝo. Ankaŭ post *manko*, *perdo*, *plena* neniam uzu DA. Post *speco* la distingo estas tiel subtila, ke mi konsilas ne uzi DA.

Apotekisto, al kiu oni regule portis por kontrolo diversajn fungojn, kutimis forĵeti eĉ la bonajn, se tiuj tro similis al venena speco, ĉar li timis, ke memfidaj homoj povus facile erari estonte pro la granda simileco. Tro subtilajn nuancojn ni lasos al fakuloj; nun ni konsideros unue la elementajn aspektojn de la problemo, kaj poste kelkajn el inter la pli perpleksigajn.

La formulo de Stojan

Stojan rigardis la elekton inter DE kaj DA la plej alta kriterio de la lingvoposedo, kaj proponis jenan formulon: "O de X estas O, sed O da X estas X". Se konvenaj substantivoj anstataŭas la simbolajn literojn, la regulo pravos: Glaso de vino = glaso (por vino); glaso da vino = vino (en glaso).

En la unua ekzemplo DE montras la destinton de la glaso; en la dua, DA montras la enhavon (mezuritan per la vorto glaso). Inter grupo de infanoj kaj grupo da infanoj estas tiu diferenco, ke la dua respondas la demandon: *Kiom da infanoj?*, dum la unua montras la konsiston, la kvaliton kaj respondas la demandon: *Kiaspeca grupo?* Alivorte DE metas la insiston sur la unuan vorton de la komplekso, kaj DA metas ĝin sur la duan. Vico da klientoj elvokas precipe bildon de la klientoj (aranĝitaj en vico).

Ĉu vi nun ĉion komprenas?

Ĉar praktiko multe pli valoras, ol teorio, ni provos apliki nian distingokapablon ĉe kelkaj ekzemploj:

1. Dum la frua parto — la jaro falis abundo — neĝo.
2. Ĉu vi rifuzus renton — mil frankoj?
3. Ni suferis grandan perdon — mono.
4. Somero estas parto — jaro.
5. Mia onklo ricevas nur cent lirojn — rento.
6. Ili plendas pri manko — informo.
7. Li aĉetis bukedon — ses rozoj.
8. Ĉu vi ŝatas tiun specon — tabako?
9. Tiu popolo — du milionoj — homoj vivas mizere.
10. Via letero superas pezon — dudek gramoj.
11. En tiu lando vivas evidenta plimulto — virinoj.
12. La plimulto — la membroj akceptis la proponon.

Kontrolo:

1. de (la jaro estas difinita); da (neĝo estas nedifinita).
 2. de (suplemento difinita).
 3. de (post perdo).
 4. de (jaro estas difinita per si mem).
 5. da (supl. nedifinita).
 6. de (post manko).
 7. de (supl. difinita).
 8. de (speco ne estas mezuro).
 9. de (supl. difinita); da (supl. nedifinita).
 10. de (supl. difinita).
 11. da (supl. nedifinita).
 12. de (supl. difinita).
- (Daŭrigota)

Henri Vatré

espero
aprilo 1

NOVA LUKTO PRI LA FRANCA EN U.N.

Kiel jam menciite en la marta "Esperanto", p. 39, dum la 22-a sesio de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, en la lastaj monatoj de 1967, okazis nova lukto pri la pozicio de la franca lingvo. (Pri la pasintjara lukto vidu la rubrikon de CED en "Esperanto", januaro 1967, p. 6-7.) La ĉefa lukto disvolviĝis en la Kvina (buĝeta) Komitato kaj tie finiĝis per granda plimulto favora al "lingva ekvilibro en la Sekretariato". La rezolucio poste aprobis la Ĝenerala Asembleo per 88 voĉoj kontraŭ 0, kun 30 sindetenoj (Usono, Britujo kaj aliaj landoj ligitaj al la anglalingva sfero).

La definitiva rezolucio asertas, ke "uzado de pluraj lingvoj en Unuiĝintaj Nacioj povus signifi ne malhelpon, sed riĉigon ..." kaj petas la Ĝeneralan Sekretarion efektiviĝi "lingvan ekvilibron interne de la Sekretariato ..." kaj "baldaŭan enkondukon de pli rapida programo de lingvo-instruado kaj de specialaj krompagoj al tiuj oficistoj ... kiuj uzas du laborajn lingvojn", (Rezolucio 2359 (XXII) de 19 decembro 1967).

Kvankam la Sekretariato de UN agnoskas du laborajn lingvojn: la anglan kaj francan, la rolo de la lasta en ĝia laboro estas relative malgranda. Jam antaŭe diversaj delegitoj asertis, ke la Sekretariato ofte malakceptis franclingvajn kandidatojn por ofico, se tiuj ne scipovis sufiĉe la anglan. S-ro Jalil (Ekvadoro) nun akuzis, ke "Tio estas ekzemplo de evidenta diskriminacio, ĉar nenio pravigas la superregon de la angla lingvo". S-ro Franzi (Italujo) plendis, ke "lia propra delegacio preferas uzi la francan, sed la Sekretariato en korespondo kun ĝi preskaŭ ĉiam uzas la anglan".

S-ro Ganem (Francujo) argumentis, ke "la lingva problemo estas aparte grava por ĉiuj delegacioj, ĉar ĝi estas ligita al la universaleco de UN kaj al la spirito mem de la Ĉarto". Laŭ s-ro Schuurmans (Belgujo), "La franclingvaj delegacioj klare montris, ke ili ne povus akcepti, ke la franca, kiu estas labora lingvo, estu submetita al kiu ajn alia labora lingvo."

En etoso, kun la soveta delegito nomis "streĉa kaj eĉ kolera", pluraj delegacioj atentigis, ke la sistemo mem de oficialaj kaj laboraj lingvoj signifas diskriminacion kontraŭ tiuj landoj (la plimulto el la Ŝtatoj-Membroj), kies lingvoj ne estas oficialaj. La japana delegito, s-ro Urabe, atentigis, ke "La Ŝtatoj-Membroj, kies naciaj lingvoj troviĝas inter la oficialaj, havas grandan avantaĝon ..., kiu reprezentas multajn centojn da miloj da dolaroj jare ..."

Aliaj delegacioj, precipe la usona, kontraŭstaris la proponon pro la kosto de la ekstraj

lingvo-kursoj kaj krompagoj, kies sumo, laŭ diversaj taksoj, povus esti inter duonmiliono kaj kvar milionoj da dolaroj jare. Sed la vidpunkto, kiu fine venkis, estis tiu de Francujo, ke "Temas pri principo, kiu ne permesas kompromison, egale kiajn ŝanĝojn de metodoj aŭ elspezojn ĝi necesigos."

Montriĝis, ke ankaŭ aliaj ŝtatoj ne akceptos kompromison: oni povas jam antaŭvidi el la ĉi-jaraj diskutoj klopodojn en la venonta sesio por plifortigi la poziciojn de la lingvoj hispana, rusa kaj ĉina. Kiel komentis la usona delegito, s-ro O'Connor: "Nun prezentigas risko de spirale kreskanta konkurenco pri la lingvo-uzo, bazita ne sur la videblaj bezonoj sed sur konsideroj pri nacia, regiona kaj kultura prestiĝo".

(Ĉiuj informoj ĉerpitaj el dokumentoj de UN A/6860, A/PV. 1642, A/RES/2359 kaj A/C. 5/SR. 1203-1227.)

PLIA FACETO DE KOSTOJ DE MULTLINGVECO

En majo, 1967, la Asembleo de la Monda Organizaĵo pri Sano (WHO/OMS) decidis "adopti la hispanan kaj la rusan lingvojn kiel laborlingvojn de la Asembleo kaj de la Plenuma Komitato" (Rezolucio WHA20.21). Ĝis tiam la t.n. laboraj lingvoj estis nur la angla kaj la franca. La oficialaj lingvoj de tiu organizaĵo estas la ĉina, angla, franca, rusa kaj hispana.

Laŭ la dokumento A20/AFL/SR/4, la du novaj laborlingvoj estos enkondukitaj nur parte dum la tri unuaj jaroj, sed la kvaran jaron ili havos egalan pozicion kiel la angla kaj franca. Laŭ la sama dokumento, la kvaran jaron la kosto de la uzo de la du menciitaj lingvoj estos entute 604 700 usonaj dolaroj, se la prezoj restos la samaj kiel en 1967.

La sumo, kompreneble, estas grandega. Ĝi, interalie, superas la sumon, kiun la sekvantaj 19 landoj pagas kiel kotizon al la organizaĵo: Afganistano, Alta Volto, Birmujo, Cejlono, Ebury Bordo, Etiopio, Gabono, Gvineo, Haitio, Jordanio, Kenjo, Libano, Maroko, Nepalujo, Nigero, Rüando, Senegalo, Singapuro, Suda Rodezio. Ĉi tiuj 19 landoj, kune, kontribuas 598 210 dolarojn al la organizaĵo. Alivorte, 19 malriĉaj landoj elspezos el siaj malabundaj financaj rimedoj konsiderindajn sumojn, sen

"YES, ESPERANTO IS THE ANSWER TO THE WORLD LANGUAGE PROBLEM"

de Ivo Lapenna

kaj

"REMARKS ON THE ESPERANTO SYMPOSIUM"

de Mario Pei

Tiuj ĉi gravaj studoj pri la lingva problemo kaj ĝia solvo aperis presite en la angla lingvo kiel 16-paĝa CED-dokumentoj Doc. A/IV/4-6. Kune ili formis konvinkan informilon bone uzeblan ekz. inter studentoj k.s. medioj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA: 1,— gld.

kia ajn konkreta profito por kiu ajn, nur por ke du pliaj lingvoj estu laboraj. Alia ilustrado: la uzo de la hispana kaj de la rusa kiel laboraj lingvoj elspezigas la tuton de la kotizoj de Nederlando (573 560 dolaroj) kaj de Islando (23 170 dolaroj).

En la Jaro de la Homaj Rajtoj CED publikigas aron da dokumentoj pri la lingva diskriminacio, ekonomiaj malavantaĝoj de multlingveco kaj kunligitaj demandoj. La plej gravaj kaj plej interesaj dokumentoj estos poste publikigitaj en la granda revuo "La Monda Lingvo-Problemo", kies unua numero aperos la 10-an de decembro 1968, do la tagon mem de la 20-jara datreveno de la Universala Deklaracio.

ESPERANTLINGVAJ ELSENDOJ EN 1967

Laŭ la statistiko, kiun ellaboris la kunlaboranto de CED por la radio, s-ro G. Larglantier, la nombro de ĉiuj radio-elsendoj en 1967 estis 2 014, kompare kun 2 290 en 1966 kaj 1 807 en 1965. La elsendoj entute daŭris 715 horojn, kompare kun 769.30 horoj en 1966 kaj kun 662.50 horoj en 1965. La nombro de stacioj estis 20 en 13 landoj, kompare kun 23 en 15 landoj en 1966 kaj kun 25 stacioj en 13 landoj en 1965. Sume, la nombro de elsendoj kaj la tuta daŭro estas iom pli malalta ol en la antaŭa jaro, sed oni devas konsideri, ke la jaro 1966 estis rekorda rilate la nombron de la elsendoj kaj koncerne la kvanton de programoj. El la listo de radio-stacioj, kiuj pli frue elsendadis, bedaŭrinde malaperis Guatemala, Madrid, Hilversum kaj Wellington, sed feliĉe aperas du novaj stacioj en Suda Ameriko: Rosario kaj Sorocaba.

Same kiel en la pasinta jaro, la plej multnombrajn programojn havis Varsovio kaj Budapeŝto (365), sed la daŭro de la programoj de Varsovio estis entute 182.30 horoj kompare kun 91.15 horoj de Budapeŝto. Sekvas Pekino (312), Bern (208) kaj Sofio (104).

Estas pli ol dezirinde, ke ĉiuj aŭskultantoj de la elsendoj en la Internacia Lingvo skribu al la koncernaj stacioj kaj komentu la elsendojn.

ESPERANTO EN "ASSOCIATIONS INTERNATIONALES"

UEA, CED kaj kelkaj internaciaj fakaj organizaĵoj regule informas la Union de Internaciaj Asocioj en Bruselo pri diversaj internaciaj kongresoj, konferencoj kaj aliaj renkontiĝoj. Tiuj informoj aperas en la monata revuo "Associations Internationales", organo de la menciita organizaĵo. Ekzemple la decembra numero de "Associations Internationales" publikigis informojn pri la kunvenoj aŭ kongresoj en 1968 de KELI, TEJO, UEA, SAT, IEJ, ILEI, IGA, Akademio; en la januara numero aperis informo pri la dokumento de CED rilatanta al la UK en Rotterdam. CED rekomendas al ĉiuj organizantoj de internaciaj

kongresoj kaj alispecaj renkontiĝoj, kiuj utiligas nur la Internacian Lingvon kiel oficialan lingvon, komuniki la koncernajn aranĝojn al: *Union des Associations Internationales, 1, Rue aux Laines, Bruxelles 1, Belgujo.*

Al la sama adreso oni komunikas informojn pri la fakaj internaciaj organizaĵoj por la Jarlibro de UIA, kies nova eldono estas nun preparata.

Donacoj por CED

	£	ŝ	p
La stato je la 2-a de decembro 1967	165-	4-	6
S-ino E. Wolfskehl, Britujo	1-	0-	0
S-ro E. F. Dean, Britujo	20-	0-	0
Kolektita en Londona Esperanto-Klubo	1-	1-	0
S-ro E. Burg, Nederlando		5-	8
S-ro B. R. Hjorth, Svedujo	1-	4-	2
S-ro Jakupović, Jugoslavio	1-	15-	0
S-ro E. Burg, Nederlando		5-	8
S-ro L. Minnaja, Italujo	5-	16-	3
S-ro E. Burg, Nederlando		5-	0

La stato je la 31-a de decembro 1967 £ 196-17- 3

Estas ĝojige konstati, ke pluraj personoj per siaj regulaj kontribuoj jam dum multaj jaroj subtenas la laboron de CED kaj ĝiajn multflankajn klopodojn ĉe diversaj internaciaj kaj naciaj instancoj. Al ĉiuj donacintoj CED esprimas tutkoran dankon, sed apartan rekonon ĝi ŝuldas al la regulaj kontribuantoj s-ro E. F. Dean, Britujo, H. V. Rasmussen, Danlando, s-ro E. Burg, Nederlando, gesinjoroj Minnaja, Italujo. El la organizaĵoj tute apartan dankon al Novzelanda Esperanto-Asocio, kiu jam plurajn jarojn regule helpas la agadon de CED. Donacojn por CED akceptas C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj aŭ perantoj, aŭ la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

le

POR PLI FORTA U.E.A.

Kial, el la dekmiloj da ĉiujaraj kursfinintoj tra la mondo (transpagipova), ne aliĝas multe pli granda nombro da novaj membroj al UEA? Mi havas la impreson, ke ili ne scias pri UEA, pri ĝia programo kaj agado, aŭ almenaŭ scias tro malmulte.

Nur en bagatela nombro de la ekzistantaj lerno- kaj lego-libroj de Esperanto troviĝas informa(j) artikolo(j) pri UEA, ĝiaj celoj, taskoj kaj agado. Nur parto de la kursgvidantoj konsideras necesa kompensi tiun mankon per solida informado pri UEA, kaj eĉ malpli multaj varbas dum la kurso kaj post ĝia fino por UEA.

Do: ĉiu aŭtoro enmetu en sian lerno- aŭ lego-libron informojn pri UEA, en ĉiu kurso la gvidanto informu pri kaj varbu por UEA. Eĉ se tio eble ne pruvigos la mirakla vergo por kreskigi kontentige la membraron, oni almenaŭ scios, ke ne kulpas la neinformiteco kaj ke la kialo estas serĉenda en io alia.

Eduard V. Tvarožek
Trenčín, Ĉeĥoslovakujo, 28 dec 67

esper
aprilo 1

SERĈANTO EN LA VIVO KAJ EN LA POEZIO

Fajro sur mia lango, poemaro de Edwin De-Kock. Eld. Stafeto, La Laguna, 1967. 119 p. 18 x 12 cm. 5,70 gld.*

La poeziamantoj jam konatiĝis kun la poezio de la sudafrika Esperanta poeto Edwin De-Kock pere de lia unua poemaro "Ombroj de la kvara dimensio". En sia bona prologo al la nuna poemaro B. Ragnarsson diras, ke la poezio de E. De-Kock estas tuta mondo, kiu fariĝas pli interesa je ĉiu antaŭenpaŝo de serioza esploranto, ke ĝi estas ne nur multifaceta, sed ankaŭ individue riĉa kaj profunda.

La senlaca intelekto de la poeto meditas pri la vivo kaj pri si mem. Por li nia mondo estas poemo simbolista, kies signifo tro subtilas, ĝi estas pilko kureganta laŭ nigraj deklivoj. Li vidas, ke en modernaj stratoj marŝas la praeco kaj la homon samaj malvirtecoj manĝas. En beboj li jam rimarkas Judasojn kaj Jesuojn. Li konstatas, ke ni konstruas religiojn multetaĝajn, katedralojn pezajn sur la homa koro. La noktoj flustras al li "vivi estas morti". Lin maltrankviligas la efemereco de la vivo kaj ke ni vivas, drivas leĝere al nenio. Li malkontentas ofte pri si kaj pri la homoj, pri ilia revrompa stulteco. Lin turmentas, ke li havis nur atingetojn en la vivo. Li havas siajn am-

biciojn kaj esperojn, li volus stari multimema, esti ne nulo, sed intensa koncentriĝo. Por li gravas la individua memo, sed li revas pri plena komunikado inter homoj. Li ne povas pardoni al si tion, ke li ne kapablas senti la realon de aliaj homoj. Sed videble li tion tamen povas, tion atestas liaj poemoj "Epizodo", "Johaneto, la mulata herbtondisto", "La domo de Blutmann, novfaŝisto". Li dubas pri la kapablo vere transsaltigi pensosparkon al nervoret' alia sed li volas fari kontaktprovon per tiu ĉi poemaro. Ne forgesu tion ĉe legado de liaj poemoj.

La poeton ne kontentigas la malnovaj ritmoj, li deziras pli naturajn parolritmojn. Pri tiu ĉi temo la poemaro enhavas aldonan eseeton. Kiom li pravos, montros la estonteco. La poeto volas poluri nian lingvon, li havas propran esprimmanieron, kelkloke tamen iom pezan. Abundas belaj metaforoj, ekz. "sulkas sola inter sombraj montoj la rivero sian larmŝoseon". Li ŝatas belsonecon, do vane li uzas tiajn kunmetitajn vortojn kiel songĝangalo, pluvvipetoj, nokttenebro ktp.

Edwin De-Kock estas serĉanto en la vivo kaj en la poezio, kaj ni esperu, ke li estontece nin surprizos per novaj belaj trovaĵoj.

Hilda Dresen (Soveta Unio)

Memkritiko. Red. Victor Sadler. Eld. Koko, 1967. 60 p. 18 x 13 cm., bind. 5,— gld.* Poemaro.

Pri nia originala literaturo iam W. Auld skribis, ha, mi ne povas indiki la fonton, sed proksimume jene: Almenaŭ en la poezia kampoj ĝi estas jam tiel alta kiel en nacilingvaj literaturoj. Ĉe la apero de la verko de Sadler mi konstatis tion denove, dum pri originala prozo mi restas ankoraŭ skeptika (inkluzive la nivelon de mia propra).

La aŭtoro, ŝajne kun influo de Ezra Pound samkiel Auld, deklaris sian starpunkton rilate la poetikon: Dotu al mi dioj, sinjoroj multombraj, forton rezisti al facilanima rimo, obstinon por laboro longa, ritmon por agordi mian palpitacion; koherigu mian penson. Purigu min je imitemo.

Li sukcesis en tiu punkto ĝenerale. Plej plaĉis al mi 29: Aliaj kantis, Vintro, pri via nudo; kelkaj pri viaj fingroj/ senkarne kru-daj; kelkaj al viaj nigroj/ rifuĝis kure, aŭ kantis virinige/ pri viaj kruroj/ neĝaj, sensange virgaj... El la 36 pecoj mi juĝas elstaraj jenajn pecojn: 46, 57, 98, 75, 71, 59, 65 kaj 62. Mi tamen ne povas kontentiĝi pri liaj tankaĵoj aŭ pseŭdotankaĵoj eble pro tio ke mi, japano, estas tro kutimigita je la lirikeco de tiu genro.

La poemaro devas troviĝi ĉe ĉiu konscienca literaturamanto, ne flatdire, sed fratedire.

Miyamoto masao (Oosaka)

Patromurdo en la nigra muelejo, de István Ráth-Végh. El la hungara tr. Maria Benczik. Eld. Hungara Esperanto-Junularo, Budapeŝto, 1967. 47 p. 14 x 10 cm. 0,50 gld.*

Kriminalrakontoj verkitaj videble de juristo: logika kunmeto de la enhavo, vortŝparemo. Aparte faciligas sekvi la enhavon substreko de la pli signifaj frazoj. Kun la klareco de la enhavo koincidas simpla lingvaĵo, en Esperanta plenumo de Maria Benczik; tio rekomendigas la libreton por la komencantoj. Tamen la altira enhavo al ĉiu esperantisto garantias 40 minutojn da distro. La libreto ne reprezentas kriminalaĵojn, al kiuj kutimigis nin la nuntempa kriminal-literaturo, ili estas fakte Pita-val-rakontoj verkitaj laŭ la tribunalaktoj el la XVIII kaj XIX j.c. Se iu amato post tiu legaĵo ekinteresiĝos pri la jurhistorio, mi ne miros.

Roman Dobrzyński (Varsovio)

NEKROLOGOJ

JOHN SMITH CLOUGH

Forpasis en januaro s-ro J. S. Clough, malnova dumviva membro de UEA kaj dum ĉ. 20 jaroj delegito en Folkestone, Britujo. Li estis 86-jara.

NICOMEDES ULLAR

La 25-an de januaro forpasis s-ro Nicomedes Ullar, delegito en San Feliu de Codinas, Hispanujo. S-inon Ullar (n. Maria Lenker, el Aŭstrujo) li ekkonis pere de Esperanto.

Gvidlibro por supera ekzameno. Vol. II. Skizo de historio kaj literaturo de Esperanto. Red. Alfonso Pechan. Eld. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1966 (1968). 190 p. 20 x 14 cm. 6,— gld.*

Por anticipi ĝin tuj: Jen libro, kies manko estis ĝise akre sentata por prepariĝoj al ĉiaspecaj iom seriozaj ekzamenoj, inkluzive de la Internacia.

Sub redakto de A. Pechan konataj aŭtoroj: Balkányi, Kalocsay, Kókény, Szerdahelyi kaj Vatré — mem sufiĉa garantio por la senriproĉindeco —, liveris ĉion sciendan pri historio kaj literaturo de Esperanto. Nature la libro volas esti informa, ne analiza, nek interpreta. Kaj tiun taskon ĝi plenumas tre kontentige, preskaŭ ĉiam senerare. Krom kelkaj eraretoj pri Volapük mi nur trovis la bibliografion iom magra kaj neekzakta. Mankas ankaŭ ĉiaj indikoj pri ekzisto de Peneter (hungara modes-teco?).

Krom pri la ĝenerala movado ĝi ankaŭ donas flugan resumon speciale pri la hungara kaj ties ĉefaj kontribuoj al la lingvo.

La plej gravaj eventoj de la historio de Esperanto estas en orda maniero aranĝitaj, kaj eĉ interese rakontitaj. La periodigo estas plejparte akceptebla, dum al mi ŝajnas, ke oni vidas tro da apartaj "skoloj". Iom dube, ĉu ekzistis aparta "germana skolo" — tiom pli, ĉar la aŭtoroj mem konfesas ties literaturan sterilon, dum la klasika koncepto (en Esperanto) de skolo male signas literaturan produktivon, kio vere validas nur por la Varsovia, Budapeŝta, Skota (ĉu ne prefere Stafeta?) kaj eble Japana. Ĉio cetera estas tute korekta kaj akceptebla kaj faras la libron de nun nepraĵo en ĉiuj ekzamenpreparoj. Ĝi estas la minimumo de scioj postuleblaj de kulturprezentanto.

Furoron!

Artur E. Iltis

Bone! Poemo de 1^a Oktobro, de Vladimir Majakovskij. El la rusa tr. K. Gusev. Eld. Komisiono de Sovetaj Esperantistoj, Moskvo, 1967. 108 p. 20 x 14 cm., ofsetita. 0,75 gld.*

Venas al ni el Moskvo traduko de la poemo "Bone!" ("Ĥaraŝo!"), verkita de Majakovskij en 1927 okaze de la deka datreveno de la Oktobra Revolucio.

Alternas en la 19 ĉapitroj de la poemo larĝaj historiaj scenoj, polemikaj kaj lirikaj pecoj kaj scenoj de la ĉiutaga vivo dum la revoluciaj jaroj. Malkontento de la popolo pro daŭrigo de la milito, sturmpreno de la Vintra Palaco far la bolŝevikoj, kontraŭrevoluciaj komplotoj kaj fremda interveno, mizero kaj malsato, rekonstruo de la lando post la terura revolucia tempesto: jaroj, skuintaj Rusujon kaj la mondon kalejdoskopas antaŭ ni, prikantitaj de la giganta lirikisto.

Tia poemo ŝajnas netradukebla, sed K. Gusev, talenta tradukinto de multaj rusaj versaĵoj kaj kantoj, sukcesis la neeblo: redoni la sencon, la ritmon kaj eĉ la rimojn de la originalo en perfektaj Esperantaj versoj. Per kelkaj versoj oni povas juĝi pri la virtuozececo de la tradukinto:

*Pro la rego, agloj kaj elita lito
kapvertigon sentas la fortunlulito.*

La prezo pagita por tiu brila traduko estas ofta malfidelo al detaloj kaj nuancoj de la originalo:

*En la forneto krakas /
volumoj de Sekspiro.
Per dentoj oni klakas, /
malsatas kun suspiro.*

En tiu keĵla "malsatas kun suspiro" bedaŭrinde forestas la elvokiveco de la majakovskija verso: "Terpomo estas por ili festeno."

Detalaj aldonitaj komentoj ebligas al la legantoj plenan komprenon pri la aluditaj okazaĵoj kaj personoj.

Gratulon al la tradukinto. Malgratulon al la "Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj kulturaj ligoj kun eksteraj landoj", sub kies ŝildo aperis ĉi libreto: Ĉi tiu certe ne tro malriĉa organismo ial opiniis inda je Majakovskij, Gusev kaj la esperantista legantaro tajpofsetitan, malbelaspektan kaj malfacile legeblan eldonaĵon. Michel Duc-Goninaz (Francujo)

Konversacia Esperanto-Kurso, de d-ro Szilágyi. Represo 1968, Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj. 69 p. 22 x 15 cm., ilustr., ofsetita.* 4,— gld.

La antaŭ nelonge forpasinta d-ro F. Szilágyi apartenis al tiu negranda aro da esperantistoj, kies aktiveco en la Movado estis multflanka kaj preskaŭ samsukcesa en ĉiuj kampoj de la agado. Kvankam restas eksterdube, ke d-ro Szilágyi pleje eminentas kiel prozverkisto, ankaŭ aliaj liaj verkoj meritas pli ol seriozan atenton. La Esperanto-eldonejo el Aabyhøj atentigas nin per la ĵus aperinta lernolibro pri la pedagogia heredaĵo, kiun al la esperantistaro postlasis d-ro Szilágyi. Kvankam temas pri represo de la verko, mi legis ĝin kiel "novan libron" kaj plene sentis ĝian novecon kaj ankoraŭn taŭgecon, malgraŭ enkonduka atentigo, ke "la metodo aperis antaŭ 30 jaroj". Kaj ĝuste tiu freŝeco, kiu radias el la libreto malgraŭ la jardekoj, ŝajnas esti plej trafa prijuĝo kaj plej taŭga rekomendo de la libro. Kun sia varieco, sprito, taŭgaj ilustraĵoj, ne nur pedagoga sed ankaŭ verkista talento, — ĉio en plaĉa eldonvesto — tiu ĉi libro restas daŭre aktuala helpilo por la komencantoj en ĉiuj landoj, ĉar ĝia tuta enhavo estas prezentita nur en Esperanto. Simo Milojević (Jugosl.)

Gepatra Bulteno, nova kvaronjara serio 1967. Bulteno por gepatroj, kiuj uzas Esperanton en la familia vivo. Eldonata kaj redaktata de Derrick P. Faux, 4, Brunswick Square, Gloucester, Anglujo; sub aŭspicio de UEA; 4 oble 28 paĝoj 11 x 17 cm. 3,50 guldenoj aŭ 14 steloj.*

La iama "Bulteno gepatra" ĉesis antaŭ 7 jaroj. Ĝi pledis por ankaŭ-esperantlingva eduko hejme. Tiu postulo aŭ deziro je aplikado de Esperanto en la familio pluekzistas. Tial la bulteno reaperas.

Ĉar la ideo, ke esperantistoj devus transdoni sian lingvon herede al siaj infanoj same kiel sian nacian lingvon, jam vivas kaj sporade realiĝas, en la nova bulteno ne estas fundamentaj artikoloj, kiuj provas pravigi tiun sin-

tenon, sed jam multaj raportoj pri la spertoj de tiaj gepatroj el diversaj partoj de nia mondo. Krome tie diskutiĝas la legaĵoj disponeblaj kun ties problemoj de tradukado kaj originaleco, prezentiĝas porinfanaj rakontoj, poemetoj, kantoj, teatraĵetoj, ludoj, ĉio el vidpunkto de la praktikantaj gepatroj. Ankaŭ enestas atentigoj pri ĝeneralaj edukproblemoj, ĉefe en la direkto de alcelata senmilita mondo.

La bulteno prezentis en sia unua jaro vastan kampon prilaborotan. Ĉu ĝi evoluos de diskutorgano al programeca fakgazeto, montriĝos. Por nia movado tia organo gravas, ĉar Esperanto ne nur estu por la plenkreskuloj, sed ankaŭ por la infanoj. Ju pli frue ili kapablas apliki nian lingvon, des pli bone.

Rev. F. Moravec (Germanujo)

A.B.C. d'Espéranto, de G. Waringhien. 2-a eld. SAT-Amikaro, Parizo, 1967. 74 p. 21 x 14 cm. Lernolibro franclingva. 2,75 gld.*

Elĉerpigis libroj, al kies represo oni pli malpli longe sopiras: "Marta" de E. Orzeszko, la "Parnasa Gvidlibro", k.t.p. Al tiu kategorio ankaŭ apartenis por la franclingvanoj la "A.B.C. d'Espéranto" de Waringhien. Feliĉe ĵus reaperis tiu aboco destinita, kiel indikas la subtitolo, al la beletremuloj.

Se oni enmanigas broŝuron pri la Internacia Lingvo al klerulo, li ja pli kritike prijuĝas ĝin, ol alia homo. Ifoje, post supraĵa trarigardo, li estas skeptika: kial *kaj* anstataŭ *et* aŭ *e?* ekzisti anstataŭ *exister?* *Semper* ŝajnas pli natura ol *ĉiam*; la akuzativo estas malmoderna balasto, k.t.p.

Waringhien klarigas tion al la klerularo: fonetiko, morfologio, sintakso kaj vortaro de Esperanto estas metode elektitaj eroj de harmonie konstruita lingvo.

Esperanto-franca leksikono faciligas al la leganto la tradukon de proverboj kaj diversaj beletraĵoj cititaj en la libro, kaj mallonga bibliografio invitas sciemulojn iri pli malproksimen ol A.B.C. en la lernado de Esperanto. Louis Beaucaire (Berlino)

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

50a datreveno de la Granda Oktobra socialisma revolucio. Tezoj de Centra Komitato de KPSU. Eld. Komisiono de Sovetaj Esperantistoj, Moskvo, 1967. 77 p. 20 x 14 cm., ofsetita.*

Wir lernen Esperanto sprechen (Ni lernas paroli E-on), lernolibro germanlingva de Ludwig Schödl. Eld. Enzyklopädie, Leipzig, 1967. 184 p. 18 x 11 cm., bind.*

Korespondaj kartoj kun kovertetoj. Eld. Kristl. Esperantoförbundet, Östansjö, Svedujo (1968). Kun kolora florbildo kaj Biblia teksteto. Serio de 8 diversaj.

La migrataj cirkonstancoj de la danaj mi-

grantaj birdoj, de Ebbe Skjerninge. Eld. la aŭtoro, Sandbechs alle 2, Hvalsø, Danlando (1967). 58 p. 21 x 20 cm., hektogr.

O problema da língua auxiliar internacional, de Apolónius. Eld. Edições Fraternidade, Lisboa, 1967. 143 p. 18 x 12 cm., 1 ilustr. Portugal-lingva, pri la lingva problemoj kaj Esperanto.

La vjetnama problemoj, de Luu quy ky. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1967. 72 p. 19 x 12 cm.*

Nord-Vjetnamio kontraŭ la U.S. aermilito, de Hai thu. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1967. 94 p. 18,5 x 13 cm., ilustr.*

La spleno de Parizo, de Charles Baudelaire. El la franca tr. Paul Lobut. Serio Oriento-Okcidento N-ro 8 sub aŭspicio de UEA. Eld. Koko, København, 1967. 122 p. 21 x 14,5 cm., bind. per ledeca plasto. 4 ilustraĵoj. 12,50 gld. (50 steloj).*

Kaijin-maru, novelo de Nogami jaeko. El la japana tr. Osaki kazuo. Dua eld. Japana Esperanto-Instituto, Tokio, 1966. 76 p. 18 x 13 cm., frontispico. 2,40 gld.*

Katalogo de verkoj de Maŭ Zedong (En Esperanto). Eld. Libroservo de Ĉina-Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 313, Pekino, 1967. 16 p. 13 x 9 cm. Senpaga.*

La mirinda eliksiro, novelaro de Johan Hammond Rosbach. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Åbyhøj, 1968. 98 p. 21 x 15 cm. 5,— gld.*

Naŭa Kongreso de la Bulgara Komunista Partio. Eldonejo de Fremdlingva Literaturo, Sofio, 1967. 183 p. 16,5 x 11,5 cm. 3000 ekz.*

Eldonaĵoj de Fremdlingva Eldonejo, Pekino, ĉiuj 14,5 x 9 cm.:

Cirkulero de la C.K. de KPĈ (16 majo 1966). 1967. 25 p.*

Pri popol-demokratia diktaturo, de Maŭ zedong. 2a eld. 1968. 26 p.*

Pri plifortigo de la sistemo de partia komitato, de Maŭ zedong. 1967. 11 p.*

Kontraŭ libroadorado, de Maŭ zedong. 1967. 15 p.*

Kvin dokumentoj de prez. Maŭ zedong pri literaturo kaj arto. 1968. 10 p.*

LOKE

Belgujo

● En februaro falis la Belga Registaro — unuavice pro la kriziĝo de enlandaj lingvaj konfliktoj inter francelingvanoj kaj flandroj. Centran rolon en la kulminigo ludis studentoj de la Universitato en Lovenjo.

Brazilo

● La Brazila Junularo ĵus ekeldonis plaĉan presitan bultenon, modeste ilustritan, sub la titolo "Impulso". "Impulso" estos precipe literatura-sciencia, kion pruvas pluraj valoraĵoj en la unua numero. Jarabono (4 n-roj): \$ 2. Adreso: BEJO, C.P. 18 (ZC - 00), Rio de Janeiro.

Britujo.

● Raporto de Konsulta Komisiono pri Klerigo en Kimrujo, eldonita 25 jan 68, rekomendis multe pli vastan uzon de la kimra kiel instru-lingvo kaj aliajn reformojn, por ke ĉiuj infanoj en Kimrujo estu dulingvaj. Hodiaŭ nur malplimulto da kimraj infanoj parolas la kimran. (Laŭ BBC)

● Lingva konflikto en la Universitato de Aberystwyth: la aŭtoritatoj decidis starigi du studentajn domojn ekskluzive por kimre-parolantoj, por "fortigi la kimran socian kaj kulturan vivon". Studenta komitato oponas, ĉar "universitato ne estas institucio dividita laŭ lingvaj aŭ rasaj kriterioj".

Cejlono

● Artikolo en la sinhallingva ĵurnalo "Davasa" (La Tago) en novembro 1967 rezultigis multajn leterojn de legantoj kaj, siavice, publikigon de Esperanto-kurso en la sama ĵurnalo 3-foje semajne ekde 2 dec 1967. La kurso, verkita de UEA-delegito d-ro C. H. Dharmatilake, aperos poste libroforme.

Ĉeĥoslovakujo

● En Bratislava fondiĝis Slovaka Esperanto-Komitato, kiel konsulta organo de la Kleriga Instituto. La Komitato nun pristudas kiel reorganizi la movadon en Slovakujo.

● Radio-stacio Bratislava, kiu jam elsendas kurson de Esperanto por slovakoj, ekde 1969 planas enkonduki nur-Esperantlingvan internacian kulturan programon.

● La plej grava ĉeĥoslovaka kultura gazeto "Literární Noviny" aperigis ĉi-jare eseon de O. Kníchal pri la lingva problemo.

● Esperanto-paĝon enkondukis la monata slovaka revuo por amatoraj teatristoj kaj deklamistoj "Umelecké slovo".

Danujo

● De post la transdono de la Propono al Unuiĝintaj Nacioj en oktobro 1966 subskribis ĝin ankoraŭ 10 pliaj danaj parlamentanoj. La Propono mem troviĝas ankoraŭ ĉiam en la manoj de la Sekretariato de UN.

● En la 60-jara jubilea kongreso de CDEL, 4-5 majo 1968 en Køge, prelegos gaste la vic-prezidanto de UEA s-ro Erik Carlén.

Eŭropo

● Nederlanda membro de la Eŭropa Parlamento starigis oficiale la demandon, ĉu la uzo de la literoj L kaj C sur la du oficialaj informiloj de la Eŭropaj Komunumoj, kiuj temas respektive pri Leĝoj kaj Komunikoj, ne diskriminacias favore al iuj lingvoj de la Komunumo (franca, itala) kaj kontraŭ la du aliaj (nederlanda, germana). Montriĝis, ke la literoj devenas de la latinaj (do pli neŭtralaj) vortoj "leges" kaj "communicatio", sed la demando en si mem spegulas la streĉan lingvan konflikton en la Komunumo.

Hispanujo

● La Esperanto-Klubo de Sabadell aranĝis elmontron dusemajnan en januaro-februaro de la sekcio "Turismo" de la Universala Ekspozicio de Esperanto, kiun preparis CED. Vizitis aŭtoritatuloj kaj granda publiko. (Foto)

● Kadre de la 10-a Barcelon-provinca Renkontiĝo (San Pau d'Ordal, 5-a de majo) okazos novstila konkurso — de interpretantoj. Ĉiu konkursanto devos interpreti en Esperanton 5-minutan nacilingvan paroladon.

Hungarujo

● La Hungara Sindikato de Fervojistoj donacis buston de Zamenhof al la hungara sekcio de IFEF. Skulptis el ruĝa marmoro Károly Kirchmajer.

Italujo

● Dektagaj senpagaj restadoj en Rimini estas la premioj de speciala konkurso por junaj geedzoj, edziĝintaj post la 1-a de januaro 1966. Detale informas: p. Albino Ciccanti, S. Bernardino, 26, I-47037 Rimini, Italujo.

● La 39-a Itala Kongreso de Esperanto okazos de la 11-a ĝis la 16-a de aprilo kun la temo "La rajtoj de la homo: forigado de ĉiuj lingvaj diskriminacioj".

Parto de la turisma ekspozicio aranĝita en Sabadell (Vidu: Hispanujo)





S-ino E. Lapenna kaj kunlaborantoj de Radio Zagreb (Vidu: Radio)

Japanujo

- Post "Franjo Tu Haŭ" kaj "Meze de l' flamoj" nun ankaŭ la vjetnama romano "Senelirejo" aperis en japana traduko farita per Esperanto. Tradukis Ide oto (pseŭdonomo) kaj Kurita kimiaĉi; eldonis librejo Kasiwa.

Jugoslavio

- Radio Zagreb en sia dua programo dissendis la 2-an de januaro 30-minutan programon nacilingvan pri la Internacia Lingvo. Samkadre kantis en Esperanto internacie konata kanzonisto Arsen Dedić.
- Okazos ĉi-jare "Internaciaj Kulturaj Ferioj" en ses lokoj en Jugoslavio: Bled (1-15 jun), Dubrovnik (15-30 jun), Porec (1-14 jul), Primošten (15-28 jul), Rovinj (15-30 aŭg) kaj Jabljak (31 aŭg - 15 sep). En Bled prezentiĝos i.a. 9 profesiaj pupoteatroj el Hungarujo, Jugoslavio kaj Rumanujo. Alajos Paulusz, reĝisoro de la filmo "Esperanto-Fonto", faros dokumentan filmon pri la aranĝoj. La programo de Primošten inkluzivos prezentojn de 4 profesiaj kaj unu amatora teatrotrupoj el Polujo, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo kaj Jugoslavio. Detale informas: SEK, poŝtfako 213, Zagreb.

Polujo

- Ĉirkaŭ 1000 anojn havas aktuale la koresponda kurso de Pola Esperanto-Asocio. Lernantoj troviĝas en 549 diversaj urboj kaj vilaĝoj.

Portugalujo

- Aperis en Lisboa pri-Esperanta libro 150-paĝa, ŝajne la unua Esperanto-eldonaĵo en tiu lando de post 1959. Ĝia aŭtoro tamen sin kaŝas per pseŭdonomo.

Soveta Unio

- Lastatempe helpis la movadon ruslingva parolado pri Esperanto de prof. E. A. Bokarev

en la Moskva Radio kaj disponebliĝo de multaj libroj en kaj pri Esperanto ĉe la Centra Moskva Biblioteko de Fremdaj Lingvoj.

Unuiĝintaj Nacioj

- Speciala komisiono de UN raportis, ke la kreskanta nombro de konferencoj ligitaj al UN kaŭzis gravan prokraston ĉe la traduka servo. La angla fako havas malfruon de 2 150 paĝoj, la franca de 4 915 p., la hispana 12 714, la rusa 21 688 kaj la ĉina 40 046 paĝoj. Ankaŭ en tiuj ciferoj speguliĝas la objektiva lingva diskriminacio ĉe Unuiĝintaj Nacioj.

FAKE

Literaturo

- La ŝtata eldonejo de Latvujo eldonis en unu volumo 47 tradukojn de konata poemo de Jānis Rainis, "Rompitaj pinoj", i.a. la Esperantan tradukon. Rainis, la plej glora latva verkisto, mem scipovis Esperanton.
- En gazetoj pola kaj hungaraj lastatempe aperis nombro da tradukoj el la originala Esperanta literaturo kaj tradukoj per Esperanto el la hungara kaj vjetnama respektive.
- Aperis nederlandlingve kolekto da tradukoj "Majstroj de la rumana rakont-arto", kompilita de la forpasinta mag. S. Pragano. Ĝi enhavas du rakontojn (de Sadoveanu kaj Bratescu-Voinesti) tradukitajn pere de Esperanto, kaj la enkonduko klarigas la valoron de Esperanto kiel traduka ponto-lingvo.

Radio

- Jam 15 jarojn seninterrompe elsendas Esperanto-programojn Radio Zagreb. En la lastaj jaroj la saman programon ripetis ankaŭ Radio Beograd. Detalojn vidu sur p. 61. (Foto)
- Fondiĝis en São Paulo, Brazilo, ĉ. 100-membra Klubo de Radioamatoroj Esperantistaj. Poŝta adreso: Av. Jabaquara 1311 - 2º, São Paulo ZP 8. Voksigno: PY 2 BF.

Tekniko

- Konferenco de la Teknika Ligo de ISAE okazos la 20-an kaj 21-an de majo 1968 en la kadro de la Internacia Industria Foiro de Budapeŝto. Tie troviĝos krome Esperanta informejo en la pavilono de Hungara Aŭto-Entrepreno.

Turismo

- Aperis novaj turismaj prospektoj en Esperanto pri Salzburg (Aŭstrujo), Kroměříž, Krupka kaj Poděbrady (Ĉeĥoslovakujo), Calais kaj Nîmes (Francujo), Tokajhegyalja (Hungarujo) kaj Amstelveen (Nederlando). Oni petu ilin de la koncernaj Turismaj Oficejoj.
- Faldfolion eldonis ankaŭ la Esperanto-Restoracio ĵus inaŭgurita en Budapeŝto VIII., Népszínház 30. Ĝi celas servi kiel manĝorenkontiĝejo por hungaraj kaj alilandaj esperantistoj.
- La Rotaria organizaĵo de Britujo decidis eldoni 5-lingvan frazlibron por vojaĝantoj, inkluzive de Esperanto.

konfer

Internaciaj Kulturaj kaj Turismaj Ferioj en Grésillon, Francujo
MODERNAJ FORMOJ DE LABORO EN LA NUNTEMPA ESPERANTO-MOVADO

Sub ĉi tiu titolo okazos de la 22-a ĝis la 27-a de julio 1968 en la konata kastelo Grésillon, Francujo, speciala seminario sub aŭspicio de UEA. En formo de Libera Tribuno estos pritraktataj jenaj temoj:

22-an de julio — Prof. d-ro Ivo Lapenna:
La socia pozicio de la nuntempa Esp.-movado
Diskuttemoj: (1) Ĉu la nuna stato de la Esperanto-movado respegulas objektivajn sociajn kondiĉojn aŭ subjektivan neefikecon de Esperanto-organizaĵoj kaj unuopuloj. (2) Ĉu la socia vivo respegulas la socian rolon de la Esperanto-movado? (3) Ĉu aktivaj agadgrupoj povas anstataŭi la subjektivan neefikecon?

23-an de julio — Jean Thierry:
La agado sur kampo kultura — (a) kiel ĝenerala socia kultura faktoro; (b) kiel kultura edukanto.
Diskuttemoj: (1) Societaj bibliotekoj — legejoj — kunvenoj. (2) Publikaj bibliotekoj — legejoj — kulturaj aranĝoj. (3) Ĝenerala lingvoservo por kulturaj interŝanĝoj. (4) Teatraj prezentaĵoj — dramaj — operaj — televidaj — radiaj. (5) Eldonaj agadoj. (6) Kunlaboro kun internaciaj organizaĵoj por kulturaj interŝanĝoj. (7) Lernejoj. (8) Universitatoj.

24-an de julio — Tibor Sekelj:
La agado sur kampo praktika — (a) memstare en la kadro de Esperanto-organizaĵoj; (b) kunlaboro kun ne-Esperantaj instancoj.
Diskuttemoj: (1) Spertoj sur la kampo turisma. (2) Fakdelegita reto. (3) Fakaj kaj specialaj organizaĵoj.

25-an de julio — Hans Bakker (aŭ alia reprezentanto de TEJO):
Kunlaboro kun internaciaj organizaĵoj
Diskuttemo: UN, Unesko, Ruĝa Kruco, Civila Servo, Eŭropa Kampanjo, Eksterblokaj landoj, Junularaj organizaĵoj, ktp.

26-an de julio — Günther Becker:
Spertoj en informado kaj komunikado
Diskuttemo: Principaro de Frostavallen.

27-an de julio — D-ro Peter Zlatnar:
Bazaj principoj por sukcesa organiza laboro
Diskuttemo: Resumaj sugestoj laŭ la pritraktitaj temoj.

Ĉiutaga tagordo dum la Seminario: Je la 8-a horo matenmanĝo; je la 9-a h. enkonduka prelego; 10-a h. diskuto laŭ la programo; 13-a h. tagmanĝo; 16-a h. daŭrigo de la diskuto laŭ la programo; 19-a h. vespermanĝo; 21-a h. "Ronda Tablo" — diskutoj pri liberaj temoj en grupoj.

Atentigo
Multaj prelegantoj kaj partoprenantoj estas estraranoj kaj komitatanoj de UEA kaj de TEJO, kiuj devas partopreni la kunsidojn de la koncernaj komitatoj; tial ni devas densigi la laboran parton de la Seminario inter la 22-a kaj 27-a de julio. La aliaj partoprenantoj povos plue ĝui la liberan tempon laŭ sia programo.

Aliĝo
Por detaloj rilate aliĝon, kotizojn kaj restadkoston bv. turni vin rekte al Esperanto-Kulturdomo, Kastelo Grésillon, F-49-Baugé Francujo. Aliĝkotizo (sen restadkosto) 20 fr.

Invito al kunlaboro
UEA kaj Esperanto-Kulturdomo en Kastelo Grésillon invitas ĉiujn Esperanto-organizaĵojn sendi al tiu Libera Tribuno de la Seminario siajn plej aktivajn funkciulojn, por ke ili per siaj spertoj kaj valoraj pensoj kontribuu al malkovro de tiaj formoj en nia agado, kiuj ebligas pli sukcesan laboron estonte.

Estrarano de UEA
por kongresoj kaj konferencoj:
D-ro Peter Zlatnar,
Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio

*Panoramo de la parko
apartenanta al la
Kastelo Grésillon,
vidata el la kastelo.
Agrabla ĉirkaŭaĵo
permesas kombini efikan
laboron kun plezura
malstreĉiĝo.*





LA JUNA VIVO

Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z., Nederlando

PEJ HAVAS 2600 MEMBROJN

Tiun astronomian ciferon konstatis la Ĉefa Estraro, 25-persona, de la reorganizita Pola Esperanto-Junularo, dum sia 1-a Plenkunsido ĉi-jare. Alia interesa temo estis la akcepto de Regularo kaj Programo por la Insigno de PEJ; tiun insignon ricevos PEJ-anoj, kiuj plenumis precize difinitajn postulojn pri Esp.-agado kaj Esp.-scio.

PEJ proponas al junaj esperantistoj ĉi-jare ampleksan programon de internaciaj kunvenoj: ankoraŭ okazos de 28 aprilo ĝis 1 majo seminario por gvidantoj pri "Turisma agado en junulara Esp.-movado" (Sieraków ĉe Poznań); de 29 junio ĝis 14 septembro kvar trisemajnaj laborbrigadoj en Bydgoszcz; 14-15 septembro oni festos la 5-an Jubileon de PEJ en Białystok; 17-30 septembro estos Dua Seminario por gvidantoj pri "Planado kaj programado de junulara Esp.-movado" en Miedzygórze. Post tiom da kunvenoj oni ripozos dum la fina "4-a Int. Feriosemajno" de PEJ en Zakopane, 27 dec.-3 jan. PEJ invitas al multnombra partopreno, precipe en la internaciaj laborbrigadoj, kiuj kostas neniom. La vojaĝoficejo "Juventur", Aleja Róż 2, **Warszawa** 61, ĉiam estas preta akcepti grupojn (min. 10 pers.) de junaj esp-istoj kaj ĉiel servi ilin per Esp-o. Oni povas rekte skribi en Esperanto al Juventur.

La "Programo Pasporto" fine, estas akceptita de PEJ, kaj ĝin prizorgas la prezidantoj de la vojevodiaj estraroj.

(A. Grzebowski)



Aspekto
de
Tarragona
(Vidu:
"Aliĝoj
jam
alvenas")

LA NEJO-KOMISIONO

1) refoje organizas Esperanto-kursojn en la-bortendaroj, en Francujo kaj Nederlando. Se vi volas vivi dum (minime) du semajnoj en primitivaj sed amiketosaj cirkonstancoj en la belega valo de la rivereto Creuse, kaj samtempe instrui Esperanton, nepre venu. Bezonataj: junaj, entuziasmaj esp-istoj, kiuj tre bone regas la lingvon kaj estas pretaj instrui laŭ detale preparita metodo. Krom instruantoj ankaŭ tre bonvenaj estas amuzantoj (kapablaj gitarludi, kantigi, ludigi, ktp.) kaj helpantoj (kiuj asistu kaj spertiĝu).

Preparseminario okazos de 8 ĝis 11 aprilo en Marseille, dum renkontiĝo de JEFO. Informojn kaj broŝuron volonte havigos: J-M. Liouville, 6 rue Léon Vaudoyer, Paris 7-e.

2) ĉiam volonte akceptos la kunlaboron de grupoj, kiuj bonvolas serioze kaj akurate plenumi skriban teston de Esperanto-lingvoscio. La testo estas bezonata por scienca esploro kun praktikaj sekvoj, kaj postulas ne pli ol 1½ horojn maksimume da individua skriba laboro.

3) bezonas tradukantojn por okaza tradukado el la angla en la francan, el Esp-o en la francan, kaj el Esp-o en la anglan. Por la 2-a kaj 3-a petoj bonvolu kontakti la red. LJV.

ALIGOJ JAM ALVENAS

al la TEJO-Kongreso en Tarragono. La ĉi-apuda bildo ne povas montri la lazuron de la maro, nek la verdecon de la etoso, kiu baldaŭ regos ĉi tie. Aliĝu ĉe S. Aragay, str. Arce 8-2-4, **Cornella** (Barcelona).

ESPERANTISTAJ SKOLTOJ, KAPTU TIUN OKAZON

La 6-a "Essex International Jamboree" en Belchamps, Hawkwell ĉe Southend, Britujo, atendas esperantistajn skoltojn, dum la periodo 27 julio - 3 aŭg. La organizantoj dissendis rekomendon al parto-prenontaj skoltoj en Aŭstrujo, Britujo, Danujo, Italujo, Nederlando, Norvegujo, Nigerio, Svisujo, U.A.R. kaj Usono, ke ili anticipu studu Esperanton. La programo, ankaŭ la jamborea ĵurnalo, la diservoj, ktp., estos dulingva: en la angla kaj Esperanto. **Esperantistaj skoltoj, kaptu tiun okazon** kaj petu informojn ĉe la sekretario de la jamboreo: Barrie Clarck, 23 Wordsworth Road, Coventry, kaj sendu kopion al la prezidanto de la Skolta Esp.-Ligo: F. D. Murphy, 7 Constable Road, Ipswich, Suffolk, Britujo.

Lastmomente: laŭ informo de F. D. Murphy, oni jam atendas 500 skoltojn el eksterlando, kaj 1500 el Britujo. La organizantoj duafoje instigis ilin lerni Esperanton, "ĉar oni multe uzos la lingvon en la jamboreo". Oni konstatis, ke jam pluraj partoprenontoj, estroj kaj geknaboj, komencis la lernadon. Landaj sekcioj de TEJO kaj landaj asocioj de UEA estas petitaj diskonigi kaj varbi, instrui kaj helpi partoprenontojn. Ili bonvolu kontakti s-ron Murphy. Esperantistaj skoltoj, kaptu tiun okazon!

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75-PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu la jarlibron 1967, 1-a parto, pp. 130-131. Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.



Ciutage	15.30-16.00	Warszawa, 50.25 m (5970 kcs), 42.11 m (7125 kcs), 41.99 m (7145 kcs), 31.50 m (9525 kcs), 25.99 m (11725 kcs), 25.42 m (11800 kcs), 25.09 m (11955 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
	19.30-19.45	Budapest, 240 m (1250 kcs), 75.09 m (3995 kcs), 48.10 m (6234 kcs), 30.51 m (9833 kcs), 25.19 m (11910 kcs), 16.77 m (17890 kcs), 13.83 m (21685 kcs). Radio Budapest, Esperanto-dissendoj, Budapest VIII, Hungarujo.
Dimanĉo	11.00-11.30	Pekino, 47.69 m (6290 kcs). I. Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Ĉinujo.
	11.30-12.00	Muritiba, 190 m (1580 kcs). I.K. Soc. Em. Radiovox, Muritiba (Bahia), Brazilo.
	12.30-13.00	Pekino, 25 m, 19 m. I.
	12.30-13.00	Sorocaba, 278 m (1080 kcs). I.K. Radio Clube de Sorocaba (São Paulo), Brazilo.
	20.00-20.20	Roma, 50.08 m (5990 kcs), 41.24 m (7270 kcs), 30.90 m (9710 kcs). P. Radio Roma. Esperantofako, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	20.05-20.30	Sofia, 50.62 m (5920 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	21.30-21.45	Teresina, 210 m (1430 kcs), 88.63 m (3385 kcs). I. P. Radio Clube de Teresina, Rua Barroso 175, Teresina (Piauí), Brazilo.
	21.45-22.00	Manila, 25.17 m (11920 kcs). P. Far East Broadcasting Co., Box 2041, Manila, Filipinoj.
	23.30-23.55	Sofia, 49.42 m (6070 kcs), 31.38 m (9560 kcs). P.
Lundo	12.05-12.15	Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 13.94 m (21520 kcs). P. (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C. Bern-16, Svislando.
	17.30-17.40	Bratislava, 428 m (701 kcs), 273 m (1097 kcs), 243 m (1232 kcs), 188 m (1594 kcs). K. Radar, Lenin-placo 13/a, Bratislava 1, Ĉeĥoslovakujo.
	22.45-23.00	Valencia, 278 m (1079 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	9.45-9.55	Bratislava. Kiel lunde.
	6.45- 6.55	Gdańsk, 230 m (1304 kcs). I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdańsk, Poll.
	12.05-12.15	Bern, kiel lunde. (S-ro C. Gacond).
	18.45-19.00	Resende, 196 m (1530 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
	23.05-23.30	Bilbao, 212 m (1412 kcs). I. P. Radio Bilbao, Apartado 1117, Hisp.
Ĵaŭdo	11.00-11.15	Manila. Kiel dimanĉe.
	21.50-22.00	Bern, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.27 m (9595 kcs), 25.25 m (11880 kcs). P. (D-ro Baur).
	23.05-23.20	Zagreb, 264 m (1133 kcs). P. Radio Zagreb, Jugoslavujo.
	23.05-23.20	Beograd, 439 m (683 kcs), 48.78 m (6150 kcs). P. (programo de Zagreb).
Vendredo	13.15-13.30	Rosario, 229 m (1310 kcs). P. Radio Nacional, Cordoba 1331, Rosario (Santa Fe), Argentino.
	14.30-14.45	Wien, 203 m (1475 kcs), P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a Wien IV, Aŭstrujo. (ĉiun alternan vendredon).
	20.00-20.30	Pekino, 45.32 m (6620 kcs), 45.17 m (6640 kcs), 42.37 m (7080 kcs), 30.43 m (9860 kcs).
Sabato	11.00-11.30	Pekino, kiel dimanĉe.
	12.30-13.00	Pekino, kiel dimanĉe.
	20.00-20.30	Pekino. Kiel vendrede.
	21.50-22.00	Bern. Kiel ĵaŭde (S-ro Gacond).
	22.00-22.30	Uberlândia 191 m (1570 kcs), I.K. Rádio Cultura de Uberlândia, Minas Gerais, Brazilo.

NOTO: La stacioj Warszawa, Pekino, Bern, Roma regule sendas senpagan programon de siaj elsendoj al petantoj.

AŬSKULTU KAJ SKRIBU AL LA ESPERANTO-STACIOJ !

espera
aprilo 1



53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrid, 3-10 aŭgusto 1968

Alta Protektanto: Ĉef-Generalo Francisco Franco, Statestro de Hispanujo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Kongresejo

La Kongresejo, la "Domo de la Sindikatoj", situas tute centre en Madrid, vidalvide al la granda muzeo "El Prado", kaj estas facile atingebla per subtera fervojo el ĉiu parto de la ĉefurbo.

Foto-konkurso

Detaloj aperas sur la antaŭlasta kovrila paĝo de ĉi tiu numero.

Broŝuro de RENFE

Kvardekpaĝa ilustrita broŝuro de la hispana fervojo, "Vojaĝi tra Hispanio estas facile", estas ricevebla de la C.O. de UEA kontraŭ 1 respondkupono por la afranko.

Statistiko (je 18 Mart 68)

Arg. 1, Aŭstral. 4, Aŭstrujo 10, Bel. 28, Bra. 5, Bri. 63, Bul. 35, Ĉeĥ. 11, Dan. 18, Finn. 12, Fra. 150, Ger. 44, Gre. 6, His. 240, Honk. 2, Hun. 13, Isl. 2, Isr. 6, Ita. 54, Jap. 14, Jug. 123, Kan. 3, Meks. 2, Monako 4, Ned. 43, Nor. 13,



Madrid: la Palaco de Komuniko (PTT) en la placo Cibeles.

NZ. 3, Pol. 19, Portu. 14, Sov. 1, Sve. 26, Svi. 9, UAR 1, Uru. 1, Usono 25.
Entute: 1005 el 35 landoj.

iala informilo
411, 1 mar. 1968

LA AŬSTRALIA ĈAMBRO

En la lastaj jaroj oni povis legi en la Jarlibro sub la rubriko "Ĉambroj de U.E.A.", ke la Aŭstralia Ĉambro estas donacata, ke la mono estas kolektata de Aŭstralia Esperanto-Asocio. Kun granda plezuro ni povas komuniki nun, ke la sumo de 5000 gld. estas kolektita, ke do la Aŭstralia Ĉambro estas donacita! Grandan dankon ni direktas al niaj fidelaj malproksimaj membroj, antipode de la Domo de UEA, en kiu troviĝas ilia ĉambro! Apartan dankon nome de la tuta Asocio ni direktas al d-ro Ross Robbins, la tiama prezidanto de AEA, iniciatinto kaj motoro de la agado, kaj al s-ro K. G. Linton, ĉefdelegito, kiu energie daŭrigis la laboron, ĝis la celo estis atingita.

En la Domo de UEA troviĝas nun 12 ĉambroj donacitaj de ĝiaj membroj, ĉu kolektive aŭ individue. Varman dankon al ĉiuj!

TESTAMENTO DE S-INO J. A. DÖBKEN-MULDER

Je la 15-a de oktobro 1967 mortis en Amersfoort (Nederlando) la dumviva membrino de UEA s-ino J. A. Döbken-Mulder. En sia testamento ŝi destinis, ke UEA ricevu el ŝia heredaĵo la sumon de 1000,— gld. Tiu sumo je la 17-a de februaro 1968 alvenis en la C.O. de UEA.

Ĉiu, kiu aktive partoprenas en la laboro de UEA, scias, kiom estas farenda kaj kiel manko de mono ofte malhelpas efektiviĝi dezirindajn kampanjojn. Tion komprenis ankaŭ s-ino Döbken-Mulder, kiam ŝi faris sian testamenton kaj decidis ion kontribui ankoraŭ post la morto, por ke la agado de UEA plivastiĝu.

La nomo de s-ino J. A. Döbken-Mulder eniros la Oran Libron de UEA. E. J. Woessink, estrarano pri financoj

INTERNACIAJ KONKURSOJ 1968

stato je la 29-a de februaro 1968

Konkurso I

Pozicio	lando	kvoto	poentoj	%
1 (1)	Nederlando	5322	3460	65,01
2 (15)	Britujo	6095	3851	63,18
3 (5)	Svislando	1949	1215	62,34
4 (13)	Italujo	3816	2345	61,45
5 (8)	Francujo	7234	4300	59,44
6 (2)	Usono	4144	2425	58,52
7 (4)	Svedujo	6415	3710	57,83
8 (3)	Danlando	2764	1505	54,45
9 (9)	Brazilo	3188	1701	53,36
10 (12)	Jugoslavio	3792	1895	49,97
11 (7)	Germanujo	6579	3215	48,87
12 (11)	Hispanujo	2919	1425	48,82
13 (6)	Japanujo	3829	1835	47,92
14 (10)	Finnlando	2608	1225	46,97
15 (14)	Belgujo	1912	775	40,53

Konkurso II

1 (1)	Kanado	955	660	69,10
2 (4)	Madagaskaro	250	157	62,80
3 (5)	Sud-Afriko	250	135	54,00
4 (2)	Israelo	488	245	50,21
5 (3)	Aŭstrujo	1270	610	48,03
6 (6)	Nov-Zelando	1265	575	45,45
7 (7)	Norvegujo	1460	595	40,75
8 (10)	Grekujo	250	90	36,00
9 (11)	Aŭstralio	1327	449	33,83
10 (8)	Argentino	693	175	25,25
11 (9)	Islando	250	50	20,00

(Reguloj aperis en februaro, p. 31. Interkram-paj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

ranto
o 1968

BRAZILLO

Bauru. FD (Edukado): Alice Aparecida Mendes de Carvalho, instruistino, Rua Antonio Alves 17-4, C.P. 587; tel. 3978. FD (Religio: Spiritismo): F-ino Maria Encarnação, kontoristino, Rua Alice Vieira Ranieri 2-56, C.P. 99; tel. 6731.

Ibiraci (Minas Gerais) 11 000. D: Virgílio Vitoriano, juĝeja oficisto, C.P. 81, Avenida Governador Valafares 238.

BRITUJO

Carnforth (Lancs) 4 000. D & FD (Religio: Kvaklerismo): A. J. Leather, eks-gasingeniero, 19 Birch Drive, Silverdale.

Edinburgh. FD (Aŭtomatoj): Michael E. Falla, sistem-programisto, 128 Montgomery St., Edinburgh 7; tel. WAV 7160.

Flitwick (Beds.) 5 000. D & FD (Elektrotekniko & Kalkulsistemo dozena): Thomas Pendlebury, elektronik-ing., 68 Maulden Road; tel. 3109.

ĈEĤOSLOVAKUJO

Bratislava. FD (Sporto): František Poboček, mekanikisto, str. Baničova 2, Bratislava-Vajnory.

Děčín (Čechy) 41 000. D: Oldřich Antoš, fervoj-oficisto, Krásnostudenecká 17, Děčín VI.

Košice. FD (Religio: Katolikismo) & (Turismo): Štefan Rejnič, seruristo, Triedna SNP - 61, Košice-Nové Mesto.

DANLANDO

København. JD: S-ino Eliza Kehlet, studentino, Ystadvej 11. DK-2850 Naerum; tel. (01) 80 13 46.

Naerum (København) 8 000. D: Torben Kehlet, fotografisto, Ystadvej 11, DK-2850 Naerum; tel. (01) 80 13 46.

Roskilde. FD (Edukado): Johannes Bjerg-Nielsen, lernejestro, Dron. Margrethevej 33; tel. (03) 35 15 32.

Viborg. D: la FD (Farmacio).

FINNLANDO

Kangasala (Hämeen lääni) 14 000. D & FD (Kulturado de grenplantoj): Matti Rekunen, agronomo, Kautiala; tel. 931-71551.

Kuhmo (Oulun lääni) 14 000. F-ino Marjatta Rautio, rektoro, Kuhmo kk; tel. 495.

Lohja. VD: Lauri Vuolo, instruisto, Salmenmäent. 1 B 10.

Tapiola (Uudenmaan lääni) 18 000. D: Raimo Strandén, muntisto, Louhentie 11 C 51; tel. 90-463451.

Turku. FD (Flegado): F-ino Tuovi Tuuli, asistent-flegistino, Linnank. 55 H 297; tel. 921-21403.

FRANCUJO

Bastia. FD (Turismo): la D.

Calais. FD (Turismo): la FD (Komerco).

F-83-Dranguignan (Var.) 25 000. D & FD (Edukado): Pierre H. M. Faivre-Duboz, Route Nationale, Montferrat; tel. 17 (Montferrat).

F-78-La Celle St. Cloud. FD (Paco): Jean Thomas, 2, Allée du Pré Bijou, Bât. 228, Beauregard.

F-79-Niort. 49 000. D: F-ino Suzanne Minault, em. instruistino, 12, rue Tattersall.

Nonancourt. FD (Scienco): la FD (Vojoj).

Serley. FD (Metio: akvosercado kaj putfosado): la D.

GERMANUJO

D-5283 Bergneustadt (Nordrh.-Westfalen) 12 000. D: Hermann Hausmann, oficisto, Auf dem Kamp 13; tel. 02261-53405.

D-4324 Blankenstein (Westfalen) 15 000.

D: S-ino Elfriede Eichler, dommastrino, Kirchstr. 1.

D-6901 Eppelheim (Baden) 9 000. D: D-ro Fritz Besold, kuracisto, Jägerstr. 2.

D-808 Fürstenfeldbruck (Bayern) 20 000.

D: Karl-Linus Leidl, em. ĉefinstruisto, D-808 Fürstenfeldbruck 2, Holzstr. 1/I lks.; tel. 08141-2016.

D-4830 Gütersloh (Nordrhein-Westfalen) 59 000. D & FD (Fervojo): Ignatz Pahnhenrich, fervojisto, D-4831 Spexard West, über Gütersloh, Postweg 6.

Hamburg. D: S-ino Elsbeth Bormann, dommastrino, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26; tel. 0411/738 4508.

FD (Interlingvistiko): D-ro Werner Bormann, univ. docento por Esperanto, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26; tel. 0411/738 4508; dum deĵortempo 349121.

Lampertheim. FD (Juro): D-ro Wilhelm Herrmann, juristo, Planckstr. 11; tel. 06206/4394.

Magdeburg. VD: Klaus-Dieter Dungert, ĥemingeniero, DDR-301 Magdeburg, Albin-Brandes-Str. 3.

Osnabrück. FD (Fervojo) & (Jurnalismo): Otto Rösemann, fervoj-oficisto, Kokschestr. 44.

D-6651 Reinheim (Saar) 1 100. D & FD (Religio: Katolikismo): Jakob Bergweiler, pastro, Kathol. Pfarramt; tel. Gersheim 606.

D-3104 Unterlüss (Niedersachsen) 4 300.

D & FD (Magio): W. Max Walther, rentulo, Südtorstr. 1; tel. 0 58 27/ 321.

GREKLANDO

Patrai (Peloponisos) 110 000. D: S-ino Sofia Stiropoulou, dommastrino, Plateia Pantokratoros 42.

HONKONGO

Hong Kong. FD (Medicino: homeopatio) & (Medicino: Naturkuracado) & (Sporto: Atletismo): la VD.

HUNGARUJO

Miskolc. FD (Juro): la D. FD (Turismo): la VD.

IRAKO

Bagdad. 1 250 000. D & FD (Komerco internacia) & (Literaturo): Husen Mohammed Al-Amily, komercisto, Deftardar Building (8a et., ĉambraro 5), Banks' Street; tel. 80792.

ITALUJO

Napoli. FD (Muziko): Roberto Improta, instruisto kaj muzikverkisto, Via Giacomo Puccini 27; tel. 243.151.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1967)

Finnlando. Helsinki: JD. Kuopio. Suomusjärvi.

Franujo. Boulogne-Billancourt: FD. Lempdes.

Hispanujo. San Feliu de Codinas.

Italujo. Laveno: FD.

Jugoslavio. Leskovac.

Nederlando. Drachten.

Usono. El Segundo. New York: VD (Washington H.)

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Carlén, s-ro Olle, Ekedalen, Svedujo.
Lindič, s-ro J., Ljubljana, Jugoslavio.
Matasin, s-ro John, Northbridge NSW,
Aŭstralio.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1968

129 Degryse, s-ro André; 130 Jaumotte, s-ro M., Belgujo. 131 Atkinson, s-ro G. B.; 132 Atkinson, s-ro Wilfrid G.; 133 Howell, f-ino Barbara; 134 Clarke, s-ro W.; 135 Cross, s-ino D.; 136 Dunbar, s-ro R.; 137 Phelan, s-ro H. K., Britujo. 138 Bjerg-Nielsen, s-ro J.; 139 Kallehave, s-ro Bent; 140 Schleicher, s-ro Ib; 141 Ziegler, s-ro Sven, Danujo. 142 Vuolo, s-ro Lauri, Finnlando. 143 Beau, s-ro Jean; 144 Béliard, s-ro Luc; 145 Cellier, s-ro P.; 146 Micoud, s-ro Fernand, Francujo. 147 Beaucaire, s-ro Louis; 148 Epstein, s-ro Felix; 149 Klünder, s-ro W.; 150 Michalik, s-ino F.; 151 Teltz, s-ro Fritz; 152 Wuenschel, s-ro H. P., Germanujo. 153 Castellort Riba, s-ro Josep; 154 Perarnau, s-ro Jaime, Hispanujo. 155 Sgroi, s-ro Rag. Rosario, Italujo. 156 Dijkstra, f-ino Jantina W.; 157 Kat, s-ro F. H., Nederlando. 158 Ahlström, f-ino M.; 159 Andersson, s-ro Bror; 160 Blid, s-ro A.; 161 Fingalsson, s-ro B.; 162 Johansson, s-ro Arvid; 163 Johansson, f-ino E.; 164 Lind, f-ino E.; 165 Lindberg, s-ro Fritiof; 166 Lindberg, s-ro Torsten; 167 Lundin, ing. Henry; 168 Olsson, s-ro Olle; 169 Sandelin, s-ro Bo; 170 Snarberg, s-ro Jack; 171 Turner, s-ro Fred, Svedujo. 172 Calvert, s-ro E.; 173 Frezzolini, s-ro D.; 174 Gerber, s-ro Wm.; 175 Kailenta, s-ro John; 176 Milsted, s-ro H. B.; 177 Schnoor, s-ro Hans K., Usono.

DONACIOJ POR GENERALA KASO (Gld.)

Germanujo: Liebl, s-ro Franz, 20,14. Svisujo: Rehmann, s-ro Alfred, 30,—.

FONDAJO CANUTO

Nederlando: Sadler, d-ro V., 1 MA; v. d. Werff-Geldmaker, s-ino P. E., 1 MJ.

Ĉiu kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto omaĝe al la prezidinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto. En tiu ĉi jaro la Fondaĵo estas uzata ĉefe por pagi kotizojn de sindonaj novaj esperantistoj en Azio kaj Afriko.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino, C.O.

ANONCETOJ

Tarifo sur la dua kovrila paĝo. Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.

Luebla de 4/5 ĝis 8/6 kaj de 10/8 ĝis 14/9, 8- kaj 6-pers. lignaj somerdometoj sur la bela insulo Terschelling, Nederlando. Informojn petu de: M. Koopmans, Fakdelegito de UEA, Verl. Oosterweg 26, Groningen, Ned. Tel. 05900-55538.

Vizitu Hispanujon sen lingvaj problemoj pere de Esperanto. Poŝvortaro Esperanta-Hispana kaj Hispana-Esperanta. Sendu ses respondkuponon al Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428, Barcelona, kaj vi ricevos ĝin per rekomendita poŝto.

Mi serĉas numerojn de la revuo Lingvo Internacia de antaŭ 1904. Skribu al s-ro R. Molera, Sta. Joaquina, 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Internacia Esperantista Semajno julio 1968. La departementa federacio de Drôme en sud-orienta Francujo organizos internacian semajnon de la 18a de julio ĝis la 25a de julio 1968. Al tiu semajno la membroj de la droma federacio invitas ĉiujn esperantistojn en la mondo. Petu ĉiujn informojn ĉe la sidejo de la federacio: 31, strato Pêcherie, F-26-Romans, Francujo.

Nederlanda Esperantisto, kiu loĝas en loĝejo kun tri ĉambroj, volas luigi du ĉambrojn kun kuirejo, duŝo kaj necesejo je 15,— gld. (60 steloj) tage al Esperantistoj, kiuj volas pasigi sian libertempon en Hago, Holando. Skribu al: S-ro J. O. de Kat, Ing., Den Helderstraat 155, Den Haag, Nederlando.

Ekspozicio por prepari enkondukon de Esperanto en Universitato. Helpu nin sendante poŝtkartojn, leterojn aŭ aliajn esperantaĵojn. Ni respondos bildkarte. Clube Esperantista, rua Espirito Santo, 646, Juiz de Fora (MG), Brazilo.

Dezirias korespondi: S-ro Markos Mula, Aparici i Guijarro, 59, Tarrasa, pri numismatiko; S-ro Sebastián Chaler, San Mariano, 159, Tarrasa, Hispanujo, kun partoprenontoj la Madridan Kongreson.

Por pli firmigi la rilatojn inter Hispana Esperanto-Instituto kaj Foiro de Barcelono, oni petas al ĉiuj, kiuj ricevis la ĉijarajn afiŝojn en Esperanto, bonvolu skribi rekte al la Foiro dankante pro la sendo.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Graĵnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Graĵnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Ĉu vi estas ĝuste informita pri la katolika eklezio kaj ĝia tutmonda agado? Abonu la organon de I.K.U.E., ESPERO KATOLIKA. Jarkotizo svisaj fr. 13.— Mendebla ĉe: Centra Oficejo de IKUE, CH-9106 Zürchersmühle, Svislando.

La Poŝtmark-kolektado daŭras. Propono: sendu poŝtfreŝajn seriojn de via lando. Tiaj ofte havas pli da valoro, ol tio, kion vi mem pagis por ili. Sendu daŭre al Peter Zacho (por UEA), Åmosevej 5 A, Kopenhago Brh., Danlando.

Preta por korespondi per skribo aŭ sonbendo estas Esperantistaro, Box 5446, Las Vegas, Nevada 89102, Usono.

Antaŭ la Universala Kongreso en Hispanujo...

nepre legu: VIVO KAJ ARTO DE GOYA
de Agostinho da Silva. 24 p. 17,5 x 13 cm.,
kun 10 ilustraĵoj kaj bibliografio.
Prezo: 0,50 gld. plus afranko. Libroservo UEA.



Unesteno

Universala Esperanta Stenografio

Nepraĵo por ĉiu

Mondo, Rothstr. 7, CH-8057 Zürich

Jam en sia dua jaro !

GEPATRA BULTENO

sub aŭspicio de UEA

Forumo kaj helpilo por gepatroj, kiuj instruas Esperanton al siaj infanoj. Subtenu ankaŭ vi ilian gravegan agadon per via abono! Aperas kvaronjare, bele multobligita kaj ilustrita.

Redaktas Derrick P. Faux. Jarabono: 3,50 gld. (8 ŝil., 14 st.). Peranto: UEA.

1968

SESDEKJARA DATREVENO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

**Helpu la kampanjon por fortikigo de UEA en
la Festa Jaro per aktiva varbado de novaj
individuaĵaj membroj !**

BINDITA JARKOLEKTO

de la revuo "Esperanto", 1967:

180 + 44 paĝoj, 99 ilustraĵoj.

Bela volumo bindita en verda tolo kun ora
surpreso.

Por Membroj-Abonantoj 1967: 7,— gld.

Por aliaj mendantoj: 14,— gld.

Libroservo de UEA

Foto-Konkurso "Homaj Rajtoj"

En la kadro de la 4a Internacia Arta Festivalo kaj okaze de la Jaro de Homaj Rajtoj 1968 LKK aranĝas internacian Foto-Konkurson kun minimume tri premioj de 100, 70 kaj 40 gld. respektive. La partopreno estas nelimigita: ĉiu rajtas konkursi per laŭvola nombro da nigra-blankaj fotoj en minimuma formato 13 x 18 cm. Kiel temon oni rajtas elekti kiun ajn citaĵon el la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (unuopaj ekz. senpage riceveblaj de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2).

Jen kelkaj ekzemploj el multaj elekteblaj citaĵoj: "La familio estas la natura kaj fundamenta grupunu de la socio" (Art. 16.3); "Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimado" (Art. 19); "Ĉiu havas rajton de laboro" (Art. 23.1); "Ĉiu havas rajton je ripozo kaj libertempo" (Art. 24).

Konkursajoj devas atingi antaŭ la 1-a de julio 1968 jenan adreson: 53-a Universala Kongreso de Esperanto, Poŝtkesto Nr. 19039, Madrid, Hispanujo. LKK resendos la nepremiitajn fotojn, nur se la konkursanto pagas la sendokostojn. Premiitaj fotoj apartenos al UEA kaj laŭeble aperos en "Esperanto". Dum la UK okazos ekspozicio de la premiitaj kaj aliaj elektitaj konkursaĵoj.

Helsingör

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 21.-28. de julio en la internacia altlernejo (tute moderna) de Helsingör, Danlando. Venu por ĝui belan feriosemajnon en vere Esperanta rondo.

Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Åbyhøj, Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ, (13.-19. de oktobro) ĉe Århus Danlando. Provizora programo jam havebla ĉe L. Friis.



Teksto: "Por la
Internacia Lingvo
— kontraŭ lingva
diskriminacio" —
"Jaro de Homaj
Rajtoj".

MEMORIGA GLUMARKO por la Jaro de Homaj Rajtoj 1968

Uzu ĝin vaste dum la tuta jaro!
Koloroj: ora, oranĝa, malhelblua.
Prezo: 0,50 gld. por 10 markoj. Eldono de UEA.

DANTE ALIGHIERI:

La Dia Komedio

Serio Oriento-Okcidento, speciala eldono



Tradukis Giovanni Peterlongo

Ilustraĵoj de Botticelli

Paralelaj tekstoj itala kaj Esperanta

Detala komentario

Prezo: 36,— gld. (144 st.)

Sola vendraĵto por la Esperanto-Movado:
UEA

LA LIBRO, KIU DONAS RESPONDON AL LA ĈEFAJ DEMANDOJ EN LA MODERNA ESPERANTO-MOVADO

Kontribuo de niaj kongresoj al internacia kompreniĝo - Esperanto antaŭ Unesko - La kultura valoro de la Internacia Lingvo - Ideologiaj elementoj de esperantismo - Internacieco de Esperanto - Ne eŭrope, sed monde internacia - Humanisma internaciismo kaj la Internacia Lingvo - Matura lingvo por matura bezono - Kontraŭ la lingvan diskriminacion - La lingva problemo en la internaciaj rilatoj...

Cio ĉi kaj multaj aliaj temoj en

ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ

de

Ivo Lapenna

Kvankam suplementa al la fama RETORIKO, la libro estas tute memstara, kaj ĉiu parolado aŭ prelego prezentas sendependan kaj kompletan tuton.

152 p., formato 20 x 15 cm (kiel Retoriko), plaste bindita. Prezo: 11 gld. aŭ 44 steloj. Mendu ĉe UEA aŭ ĉe via landa libroservo.

Bone memoru.....

.....En la famobрила "Valo de Loire"

La ESPERANTISTA KULTURDOMO

(Fondinto: H. Micard)

Kastelo Grésillon, 49 - BAUGE - Francujo.

proponas al vi printempan restadon

(alventago:

4-a de Aprilo - Forirtago: 11-a de Aprilo)

Kultura Semajno org. de U.F.E. kaj G.E.E.
Programo: Pliprofundigo de la lingvokonoj per tekstoj; pedagogia inicado al instruo de la lingvo; kultura kaj arta aplikado de la lingvo; prelegoj; distroj; ekskursoj.

Dum la tuta somero 1968a

la Esperantista Kulturdomo prezentas tutan serion da E.-renkontoj.

Je plej alta nivelo estos la

**INTERNACIAJ TURISMAJ kaj
KULTURAJ FERIOJ**

Seminario organizita de UEA (alveno 22an de Julio, Foriro 1-an de Aŭgusto) pri la temo "Modernaj Formoj de Laboro en la Nuntempa Esperanto-Movado".

Partoprenos prof. d-ro Ivo LAPENNA kaj aliaj plej kompetentaj respondeculoj sur diversaj kampoj de aktiveco en Esperanto-movado.

Gvidanto: D-ro Peter Zlatnar, Rimska 7,

LJUBLJANA

Ekskursoj, GRANDA RALIO, organizitaj de E.K.D.

— dum ĉiuj periodoj, gvidataj ekskursoj, distroj diversaj —

Petu la programojn. Bonvolu rezervi la ĉambrojn sufiĉe frue. De Pasko ĝis Julio, kaj dum Septembro, estas eble akcepti grupojn, eĉ ne-esperantistajn, por pli malpli longaj periodoj.

— Informoj kaj aliĝoj ĉe supra adreso —

Oni skribis pri

KAŬKAZAJ RAKONTOJ

"Ĉi tiuj rakontoj estas ĝuo por la amatoroj de streĉaj aventuroj, sed ankaŭ de bela prozo, ĉar Lermontov, giganto de la rusa poezio, estas ankaŭ majstro de la prozo, kaj feliĉe la traduko de D. Staritsky estas ne nur fidela, sed ankaŭ vigla kaj bonstila."

Michel Duc-Goninaz en Heroldo

"Kvankam la rakonto estas strikta, dinamika kaj tute ne enuiga, oni bezonas trankvilan horon, se oni vere volas ĝui ĝin en ĉiuj nuancoj. Kaj tio, ŝajnas al mi, estas signo, ke temas pri 'klasikaĵo'."

Stefan Maul en Germana Esperanto-Revuo

"Turnante la lastan paĝon oni pensas bedaŭre: 'ha! jam finita!', kio estas laŭ mi la plej bona — kaj por esperantlingva verko malofta — komplimento."

G. L. en SAT-Amikaro

Prezo (kun alloga moderna bindaĵo): 5,— gld.